

BULGARA

11. 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





La solenan kunsidon gvidis Petar Tančev, sekretario de la Bulgara Agrara Popola Unuiĝo kaj Unua vicprezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario. En sia enkonduka parolo li substrekis, ke la 13-jarcenta jubileo de Bulgario transiris la limojn de nia lando: multaj registaroj politikaj partioj sociopolitikaj kaj internaciaj organizaĵoj per diversaj kulturaj manifestadoj notis la 1300-jaran jubilon de Bulgario, esprimante tiamaniere siajn amikecon, estimo, kaj simpatio al la bulgara popolo.

En la solena kunsido nia unua partia kaj ŝtata gvidanto Todor Jivkov legis sian rimarkindan kaj inspiritan «Parolon pri Bulgario». Per ardaj vortoj li parolis pri al plej valoraj trajtoj de la bulgara popolo: pri ĝiaj demokratiaj kaj revoluciaj tradicioj, pri ĝiaj laboremaj streboj al klerigo kaj kulturo, humanismo patriotismo kaj internaciismo, pri ĝia historia optimismo. Hereditaj de niaj praaĵoj, lumigitaj de l' abnegacio de la herooj, tiuj ĉi trajtoj hodiaŭ karakterizas nin kiel popolon, kiel civitarojn de socialisma ŝtato. Simbole ili estas spegultaj en la monumento «1300 Jarojn Bulgario» — en la supreniranta spiralo komencanta de la subtero — ĝi kvazaŭ eliras el la sino de la historio, pasas tra memorigaj eventoj, enkorpiĝitaj en la skulptaĵoj, kaj finiĝas per du flugiloj, pretaj por flugo. Al la estonto!...

La 20-a de oktobro estis tago de bilanco, pritaksoj kaj perspektivoj. Nuntempa Bulgario, kolektinta en si mem la sperton kaj la saĝecon de multaj generacioj trovinta en la socialismo novan destinion, atinginta la apogon de sia dekjarcenta historia evoluo, havas fidelan kaj elprovan gvidanton — la Bulgaran Komunistan Partion kaj ĝian Ĝeneralan sekretario kdon Todor Jivkov.

1300-JARA BULGARIO JUBILEAS

La 20-a de oktobro 1981 estis memora tago en la historio de Bulgario. Tiun ĉi tagon la tuta bulgara popolo kaj ĝiaj amikoj en la mondo festis la 1300-jaran jubileon de la bulgara ŝtato.

Bulgario eniris sian 14-an jarcenton kaj de la alteco de tiu ĉi historia pinto ni pritaksas nian antikvan kaj novan historion la nunan tagon de nia Patriotismo kaj direktas rigardon al ĝia estonto.

La 20-a de oktobro — la Tago de la bulgara ŝtato, estis kulmino de la tutpopola festado: en Sofio, Veliko Tarnovo, Tolbuhin Kotel kaj aliaj urtoj estis solene inaŭguritaj monumentoj honore al la fondinto de Bulgario ĥano Asparuh kaj liaj posteuloj — kiel esprimo de la popola dankemo.

En tiu ĉi glora festotago en la granda halo de la Popola palaco de kulturo «Sofia» okazis solena kunsido kiun partoprenis partiaj, ŝtataj kaj politikaj gvidantoj fronte de la Ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj Prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario Todor Jivkov. Ĉeestis ankaŭ gvidantoj de 65 fremdlandaj delegitaĵoj, ĉefoj de diplomatiaj misioj akredititaj en Bulgario, specialaj reprezentantoj de la Unuiĝinta Nacio kaj de UNESKO, eminentaj agantoj de la bulgara scienco, kulturo kaj arto, herooj de la socialisma laboro, veteranoj de la partio.

Fidela al siaj internaciismaj tradicioj, nuntempa Bulgario havas multajn amikojn en la tuta mondo. De jarcentoj kaj por jarcentoj sincera amikeco ligas ĝin kun Sovet-Unio, kun la partio de Lenin. Unueco de la celoj kunligas ĝin kun la aliaj landoj de la socialisma komuneco. Bulgario estas pacema lando, kiu emas starigi amikajn kontaktojn kaj kunlabori kun ĉiuj popoloj de la terglobo. Pro tio en la tago de ĝia jubilea festo ĝiaj amikoj — reprezentantoj de diversaj landoj, rekonas ĝian kontribuon al la tuthomara civilizo.

Ĉe la solena inaŭguro de la monumento «Bulgario — 1300» Todor Jivkov diris: «La monumento, konstruita en la ĉefurbo de socialisma Bulgario, estu simbolo de la senmorteco de la bulgara popolo! Tiu ĉi monumento estu brila simbolo de nia strebo al feliĉo kaj bonstato de nia popolo, en la nomo de la plua konstruado de nia kara socialisma Patriotismo — Popola Respubliko Bulgario».

Ardaĵ vortoj direktitaj al la estonto!



PAROLO PRI BULGARIO



(El la parolo de Todor Jivkov, ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata soveto de PR Bulgario, dediĉita al la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato)

KARAJ SAMLANDANOJ, AMIKOJ DE BULGARIO EL ĈIUJ MONDPARTOJ, GEFRATOJ,

La historio, tiu ĉi saĝa instruisto de la popoloj, nun mezuras karan por ni horon — la bulgara popolo transpaŝas la limon inter siaj dektria kaj dekkvara jarcentoj.

La antikveco de la ŝtato estas motivo por fiero. Duoblan rajton fieri havas tiu popolo, kiu fieras ne nur pri sia iama gloro, sed ankaŭ pri siaj nuntempaj atingoj.

Tiutage la bulgara popolo povas plenrajte fieri. Dum sia 13-jarcenta historia vojo la bulgara popolo ne nur venkis la ŝangemon kaj la kapricojn de la sorto — hodiaŭ ĝi staras antaŭ la juĝo de la mondo, fiera pri sia pasinteco, majesta en sia hodiaŭa tago, trankvila pri sia estonteco de popolo apartenanta al la avangardo de la homa progreso.

Ni estimas la pasinteco de Bulgario, sed ni ne forgesas, ke ĝia historio estas historio de klasaj socioj, de klasbataloj. En tiu ĉi pasinteco estas ankaŭ obskuraj periodoj de venko de la reakcio, estas teruraj popoloj kaj naciaj tragedioj.

Sed eĉ ne unu tirano, fremda aŭ nia, ne povas fanfaroni, ke la bulgara popolo ĝustigis antaŭ li. La historio memoras la potencon novadan de la bogomilanoj, en ĝi brilas la venka glavo de la vilaĝana caro Ivajlo. Dum kvin longaj sklavaj jarcentoj en nia lando vivis la legendo pri la rajdantaro de caro Ivan Sisman*.

Senĉesaj klasbataloj karakterizas ankaŭ la jarcenton, kiu pasis post nia liberigo elsub la turka juĝo. Se estas necese per unu vorto esprimi la esencon de

nia historio, tiu ĉi vorto estas batalo. Kaj ĉiam en la unuaj vicoj de tiu batalo marŝis la plej karaj popoloj gefiloj, la plej helaj mensoj de Bulgario — popoloj klerigantoj, hajdutoj kaj vojevodoj, ribeluloj kaj revoluciuloj, kaj dum la lastaj naŭ jardekoj — ankaŭ la bulgaraj komunistoj.

Nia popolo estas fiera pri siaj atingoj, pri sia historio. Ni fieras, ke «ankaŭ ni donis ion al la mondo». Al ni estas fremdaj la nacia memŝato, la nacia orgojlo. Sed al tiuj, kiuj provas humiligi kaj kalumni nin, falsi kaj prirabi nian pasinteco — al ili ni direktos la vortojn de la flama patrioto kaj popola kleriganto Paisij Hilendarski: «Legu la historion!»

Ni faras bilancon de la 13-jarcenta historio de la bulgara ŝtato en la jaro 1981 — la trideksepa jaro de ekzistado de nia socialisma ŝtato.

Jen estas antaŭ ni kaj en ni nia aliĝita kaj renovigita Patrolando. Ni provu imagi kiel fierus pri ĝi niaj antaŭuloj, se ili povus vidi ĝin tia kiel ni, iliaj posteuloj, vidas kaj kreas ĝin!

La venko de la socialisma revolucio je la Naŭa de Septembro 1944 metis epokfaran komencon — la komencon de grandiozaj ekonomiaj, politikaj, socialaj, kulturaj kaj moralaj ŝanĝoj. Efektivigis multjarcenta revo — la popolo estigis mastro de sia ŝtato, de sia sorto!

Bulgario de la malriĉuloj, Bulgario de la plugilo kaj la pioĉo, de dornohavaj plugkampoj kaj de malgrasaj bovoj, Bulgario de la urba mizero, de malabundeco kaj malsato restis nur en la paligintaj rememoroj de la pli aĝaj homoj kaj en la verkoj de niaj kreantoj.

Nun Popola Respubliko Bulgario estas progresinta industri-agrara lando, kiu posedas solidan materialan-teknikan bazon, modernan industrion, pligrandigitan

* Bulgara caro (1371—1393), dum kies regado Bulgario falis sub la juĝo de la Osmanaj turkoj.

kaj mekanikigitan kamparekonomion, per rapidaj ritmoj evoluantan nacian ekonomion, konstante plialtigitan vivnivelon de la laboruloj, florantan kulturon. Ĝi estas lando, en kiu stabiligas la socialisma vivmaniero kaj formigas la nova homo — laborulo kaj kreanto, patrioto kaj internaciisto, konvinkita batalanto por triumfo de la komunismo.

Ni plenrajte povas diri: *En la socialismo la bulgara popolo trovis solvon de ĉiuj plej gravaj problemoj de sia ekzistado kaj evoluo.*

Ĉio, kion ni atingis per grandegaj fortostretoj, ĉiuj rilatoj, kiuj nun estas komuna posedaĵo, ĉio ĉi estas frukto de la nesancebla kredo je la ideoj kaj je la faro de socialismo kaj komunismo, frukto de abnegacia laboro.

Kaj ĉion ĉi nia popolo atingis sub la gvidado de la Bulgara Komunista Partio.

Al la heroo Komunista Partio — organizanto, gvidanto kaj inspiranto de nova Bulgario — gloro!

Guste Bulgario estis la unua slava ŝtato, kiu proklamis la politikan kaj spiritan vekigon de la multmilionna slava mondo, helpis al ĝi atingi al la tiama civilizo kaj eĉ okupi lokon en ĝiaj frontaj vicoj.

Gloro al la unuaj grandaj konstruantoj de la bulgara ŝtato — la hanoj Asparuh, Krum kaj Omurtag, princo Boris la Unua, la caroj Simeon, Samuil, Asen kaj Petar, Kalojan kaj Ivan-Asen la Dua, sub kies gvidado ja bulgara popolo kreis sian centrigitan ŝtaton!

Bulgario estas patrolando de la slava alfabeto, de la slava literaturo kaj kulturo.

Gloro al la fratoj Cirilo kaj Metodio, kiuj en la obskuro de la frua mezepoko donis al nia popolo kaj al al tuta slavaro la neestingeban torĉon de la klerigo kaj al progreso.

De Cirilo kaj Metodio kaj de iliaj adeptoj la bulgara kulturo heredis siajn humanismajn, demokratiajn

kaj revoluciajn tradiciojn. Fidele al tiuj ĉi tradicioj estis Ĉernorizec Hrabar kaj Patriarko Evtimij, Paisij Hilendarski kaj Sofronij Vračanski, Georgi Rakovski kaj Petko Slavejkov, Hristo Botev kaj Ljuben Karavelov, Zahari Stojanov, Ivan Vazov kaj Elin Pelin, Hristo Smirneski kaj Nikola Vapcarov.

Gloro al la popoloj klerigantoj, literaturistoj kaj revoluculoj, kiuj kreis kaj kreas la veran belartan historion de la laboro, bataloj kaj sopiroj de la bulgara popolo.

Nia popolo travivis kelkjarcentan sklavecon, kiu bremsis ĝian naturan evoluon. Ĝi estis senigita de sia ŝtato, de terposedaĵo, de rajtoj, de sia ortodoksa konfeso, estis senigita je ĉio, krom la espero. Al ĝi ĉio estis malpermesita, ĝi havis nur unu rajton — obedi. Ni povus diri, ke tio estas malfeliĉaj jarcentoj de malhonoro en nia historio, se ili ne estis lumigitaj de la konstantaj bataloj por libero kaj sendependeco.

Venis la tempo de nia renaskiĝo — de la bulgara Renesanco, kiu naskis la grandajn ideologojn de la nacional-demokratia revolucio — Georgi Rakovski, Ljuben Karavelov, Vasil Levski, Hristo Botev, Georgi Benkovski. Centoj da sekretaj revoluciaj komitatoj metis la komencon de originala popola batalorganizaĵo.

Kaj en aprilo 1876 eksplodis la Aprila ribelo — la bulgara popolo manifestis ekskluzivan heroaĵon kaj ofertecon kaj pruvis, ke ĝi meritas esti libera.

Ni adore kliniĝu antaŭ la hela memoro kaj la admirinda sinifero de la famaj kaj sennomaj popoloj klerigantoj el nia Renesanco epoko, antaŭ la martiroj kaj la herooj de nia nacia revolucio! Estu eterna ilia gloro!

Nian liberon permilitis la rusaj soldatoj-bravuloj kaj ankaŭ soldatoj el Rumanio kaj Finnlando. Senlima estas nia dankemo al la rusaj fratoj — liberigintoj.

La rusaj soldatoj kaj la bulgaraj volontuloj per sia sango konstruis eternan monumenton de la bulgara-rusa frateco kaj amikeco.



La honora prezidantaro de la solena kunsido «Bulgario 1300»

Ni adore kliniĝu antaŭ la herooj, kiuj lasis siajn ostojn en la sankta bulgara tero kaj fekundigis ĝin por nova supreniro.

Post la liberigo de Bulgario elsub la Otomana jugo la bulgara burĝaro perfidis la ideojn de nia Renesanco. La ideojn de niaj revoluciuloj-demokratoj, la idealon pri sankta kaj pura respubliko.

Sed nur dektri jarojn post la Liberigo, en Bulgario per jarcentoj postrestinta en sia soci-ekonomia evoluo estis fondita la revolucia marksisma partio de la bulgara proletaro, de la bulgara laborpopolo.

Kaj nia popolo naskis novajn grandajn revoluciojn. Dimitar Blagoev estis unu el la plej grandaj marksistoj de sia tempo. Kune kun siaj famaj kunbatalantoj li metis la fundamentojn de la Bulgara Socialdemokratia Partio kaj en mallonga periodo transformis ĝin en batalkapablan idean kaj revolucionan forton.

La iama kompostisto Georgi Dimitroff, kune kun Vasil Kolarov ekstaris ĉe-kape de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo — la Septembra ribelo en 1923; je la Lajpcega juĝproceso li donis la unuan frakasitan idean-politikan kaj moralan baton al la faŝismo.

En la progresema kamparana medio formiĝis la granda demokrato, gvidanto de la Agrara unuiĝo kaj ŝtatestro Aleksandar Stambolijski.

Kvarfoje la laborpopolo levigis je armita batalo kontraŭ la monarĥio, kapitalismo kaj faŝismo kaj trifoje — en la aŭtuno de 1918 apud Vladaĵa (la Soldata Ribelo) kaj en junio kaj septembro 1923 — ĝi estis dronigita en sango.

Komenciĝis la Dua Mondmilito. Plenumante sian patriotan kaj internacian devon, la Bulgara Komunista Partio organizis la laborulojn por la lasta decida batalo kontraŭ la burĝa-faŝista regpotenco.

Laŭ la hajdutaj vojetoj ekiris partizanoj — laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj; komunistoj kaj anoj de la Junulara Laborista Organizaĵo; anoj de la Agrara unuiĝo kaj senpartuloj. En la urboj sentime agis batalgrupoj. En la vilaĝoj partizanhelpanoj, ignorante la mortdangeron, oferante sin mem, siajn familianojn kaj domojn, donis azilon kaj nutraĵon al la popolaj batalantoj.

Kaj venis la granda Unua Tago — la Naŭa de Septembro 1944. Per la decidiga helpo de la Soveta Armeo nia popolo realigis la socialisman revolucion, kiu malfermis novan paĝon en la bulgara historio.

En nia historia memoro havas sian lokon sennombraj herooj kaj nomoj de herooj, ĉar sennombraj estas la herooj — famaj aŭ modestaj, mortaj aŭ vivaj, al kiuj en tiu ĉi tago ni devas atesti sian estimon. Gloro al ili!

Gloro al la entuziasmoplenaj konstruantoj de la unuaj jarkvinoj, kiuj propagandis la socialismon, konvinkis, altiris la ceterajn post si, kiuj plugis la limsulkon inter la privataj terposedaĵoj, konstruis uzinojn kaj barajmurojn, konstruis la fortikajn fundamentojn de nia juna respubliko!

Gloro al tiuj, kiuj per inspirita laboro konstruas la evoluantan socialisman socion en Bulgario!

Je la sojlo de sia dekkvara jarcento la bulgara ŝtato havas stabilan internacian situacion, fidelajn aliancinojn kaj amikojn, tutmonde rekonitan kaj konstante kreskantan prestiĝon.

Nun Popola Respubliko Bulgario subtenas intensajn diplomatiajn, ekonomiajn kaj kulturajn kontaktojn kun preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de nia planedo, aktive partoprenas en la plej aŭtoritataj organizaĵoj kaj forumoj, ĝi mem estas iniciatinto kaj dommastro de gravaj internaciaj iniciatoj kaj manifestaĵoj.

Bulgario faris kaj faros ĉion eblan por serenigo de la internacia situacio, por stabiligo de la paco, por plibonigo de siaj rilatoj kun la balkanaj ŝtatoj.

Ni varme subtenas la ideon pri transformo de la Balkanoj en zonan sen nukleaj armiloj.

Kia estos morgaŭ nia kara Patrolando?

Ni vidas la dekkvaran jarcenton de Bulgario kiel jarcenton de la komunismo, de plena triumfo de la libero, frateco, feliĉo kaj beleco!

Ni firme kredas, ke nia junularo prenos el niaj manoj la standardon de Bulgario, ke ĝi estos inda je siaj antaŭuloj, je siaj gepatroj!

Gloro al la bulgara popolo!

Vivu la amikeco kaj la kunlaborado inter la bulgara kaj la soveta popoloj, inter la bulgara popolo kaj la popoloj de la aliaj socialismaj landoj, inter la bulgara popolo kaj ĉiuj ceteraj popoloj en la mondo!

Estu benita nia gepatra lando Bulgario!



LINGVO SANKTA DE L' PRAAVOJ NIAJ!...



Dum la milcentjara historio de la Patrolando la gepatra parolo estas hela standardo kaj batalglavo, tenera kanto kaj rava legendo. Kaj ĉiam la parolo de la labora popolo estis voĉo de la vero, voko al hela estonto. La parolo estas konfeso kaj ĵuro, unu nekvietigita energio, kiu gvidas kaj inspiras al heroaĵoj por la feliĉo de la popolo.

Kiam de la alta supro de socialisma Bulgario ni rigardas malantaŭen al la pasintaj dek tri jarcentoj de la Patrolando, ni pli klare konscias la historian meriton de Cirilo kaj Metodio, la modestan senpretendan agadon de la sennomaj kantistoj kaj rakontistoj, de poetoj kaj verkistoj, kiuj modelis kaj pliriĉis la bulgaran parolon.

En la tagoj de la jubileo ni turnas niajn okulojn al la jarcentoj de malluma sklaveco kaj kun sincera admiro gloras la bulgaran parolon — la plej fortan apogon de niaj nacia fierco kaj vigla konscio, kiu ekbruligis la fajron de la Bulgara Renesanco, helpis al ni rezisti kaj resti kiel popolo por ke ni komprenu la sencon de la nacia kaj socia batalo, por ke ni skribu sur la verdokolora ribelula standardo la flaman vokon: „Libero aŭ Morto“.

La parolo estas nia revolucia memoro. Ĝi estas legendo pri Otec Paisij, kiu aŭdace levis en la mallumo de la sklaveco la torĉon de la vero. Kaj unu nemalfortiginta kanto pri la simpla kaj klara revolucia parolo de Vasil Levski kaj Georgi Rakovski, de Ljuben Karavelov kaj Georgi Benkovski, pri la neripetebla mildeco kaj potenco, pri la vulkana forto kaj ĉarmo en la inspiritaj paroloj de la genia poeto kaj batalanto Hristo Botev.

Generacioj kantas kaj ripetas: „Tiu, kiu

falas en batalo por libero — li ne mortas!“

Generacioj promesas pasie kiel Botev servi al la Patrolando kaj al la laborpopolo. Generacioj komparas sian idean, klasan kaj patriotan maturecon kun la agoj kaj paroloj de la herooj. Kun la kantoj de Botev marŝis la partizantoj, kun tiuj ĉi kantoj iris al pendigiloj kaj al mortpafo, iris al senmorteco la batalantoj.

De la fama „Simbolo-Kredo“ de Hristo Botev kaj ĝis la planoj de la XII-a Kongreso de Bulgara Komunista Partio — unu senfina kaj suprenira linio signas la idean-politikan maturecon de la popolo. En la konscio de la popolo la parolo de la Partio estas parolo de la vero. Jam de la komenco mem la komunistoj komencis sinceran interparolon kun la popolo pri la socia maljusteco, pri la klasa kontraŭulo, pri la batalo kaj pri la estonteco. Per la helpo de la Partia parolo maturiĝis en la konscio de la klaso la socialisma ideo, por ke ĝi fariĝu forto, kiu ekgvidis la popolon al la venko de la revolucio. Dum la jaroj de la kapitalismo, de tiu ĉi parolo tremas la malamikoj, kaj la laboristoj, la laboruloj vidas la vojon al la saviĝo. En la libera Patrolando la parolo de la Partio forigas la dubojn, inspiras kredon. Hodiaŭ tiu ĉi parolo denove estas armilo, kiu inspiras la konstruon de la matura socialisma socio. La Partia parolo estas ŝargita per la justeco kaj la forto de niaj idealoj kaj tial la homoj kredas al ĝi. La fonto de tiu ĉi kredo estas en la unueco inter paroloj kaj agoj en la politiko de la Partio.

[La parolo estas nia belarta memoro. La tuta netaksebla riĉeco, kiun kreis niaj antaŭuloj kaj kiu estas konservita pere de la parolo, hodiaŭ, ĉe la socialismo, estas tutpopola posedaĵo. Ni estas laŭleĝaj heredintoj de la altvalora popola trezoro. Tio estas granda feliĉo kaj grandega respondeco. La arta parolo konservis la pensojn de sennombraj talentaj gefiloj de la Patrolando, kiuj lasis al ni neripeteblan mondon de ideoj kaj bildoj, kiuj instruas kaj edukas, kiuj nobligas nin. En ili vivas nia historio kaj nia memoro. En ili estas fajreroj de la granda fajro de la progreso, de la komunisma vero. Kaj ili ĉiam estos al ni necesaj. Kaj al ni, kaj al niaj heredontoj. Ĉar ni plej ĝuste konscias kien vojon ni trairis, kiajn esperojn havis la generacioj, antaŭ ol venis nia socialisma tago. Neanstataŭebla kronikisto de la popola sorto estas la parolo.

Eterne vigla memoro estas la gepatra parolo, memoro, kiu flamigas la korojn por agado inda je nia glora kaj heroa krea tempo.

POEMO PRI BULGARIO

EVTIM EVTIMOV

Rajdantoj ŝtorme flugas vigleharaj
sub fulme maltrankvila firmament',
kaj Asparuh kun vi, ideo kara,
impetas sur ĉevalo kiel vent'.

* * *

Ankoraŭ estas vi malgranda, pala
en lia viglepulsa, reva kor',
Konata al neniŭ, virtuala,
sur voj' naskita ie for.

* * *

La ĥan' starigas super la Danuba
akvar' malvarma sur decida pont',
belegan nomon portas li, ter' suda, —
nomigu Bulgario por estont'!

* * *

Vilaĝo eta estu en la foro,
sed ĉiam havu nomon Bulgari',
vojeto estu en montara koro,
sed ĉiam portu nomon Bulgari'!

* * *

Vi estu de montaro roka pinto
garnita per vitar' de l' ĉarma ter',
en grundo estu grajno ekdorminta,
sed gardu vian nomon por etern'!

* * *

Kaj kvankam via vojo estos kurba,
vizaĝon vian batos neĝa ŝtorm',
el Pliska faru bazon — la ĉefurbon,
disfloru en Preslav belarta form'!

* * *

Kaj ĉiam estu preta sur ĉevalo,
el ŝtonaj turoj flugu al atak',
kun hunoj kaj barbaroj en batalo
flirtadu brave la bulgara flag'!

* * *

Subite malamiko vin subpremos,
sed ĉiam estos vi la sankta ver',
kaj via voĉo sonos en katenoj,
sed vi ne malaperos sur la ter'.

* * *

Jarcentojn kvin tintados ĵatagano
kaj la parolo surdos en silent',
vi mangos nigran kaj maldolĉan panon
kaj ĝemos, ve, sub nuba firmament'.

* * *

Sed venos via brava Levski forta,
obstine kaj senlace frap' post frap',
disrompos li la maŝojn de la morto
pendantajn super via sklava kap'.

* * *

Kaj venos Botev sur hajduta pado
spertanta mem sklavaĵojn en abund',
ĉesigos li de l' kuglo la flugadon
al via koro per fiera frunt'.

* * *

Vi supervivis kvinjarcentan jugon,
la savo venas el la orient',
kavalerio rusa spacon plugas,
atendas ĝin bulgara firmament'.

* * *

Renkontu ĝin ĉe Ruse kaj ĉe Pleven
kaj montru vojon tra Danuba ter',
standardon de Samara kislafidele
traportu tra Balkano en koler'!

* * *

Sur Buzluĝa radie brilos alte
grandega nova lumo en purpur',
de tiu glora pint' senmorta arde
ĝi gvidos vin en frido kaj obskur'.

* * *

Alterne marŝas viaj helaĵ jaroj
jubile super mi en vigla sprint',
ĉi jaroj de kantad' kaj noblaĵ jaroj
iradu ĉiam supren al la pint'.

* * *

Tradukis: VIOLIN OLJANOV
(Gajninta I premio en la belarta
konkurso de «BE» — 1981)

VOĈOJ EL LA JARCENTOJ . . .

«Ĉu Dio ne sendas pluvon egale al ĉiuj? Ĉu la suno
same ne lumas por ĉiuj? Kaj kiel vi ne hontas, re-
konante nur tri lingvojn, por ke ĉiuj ceteraj popoloj
estu blindaj kaj surdaĵ?»

KONSTANTINO-CIRILO LA FILOZOFO,
kreinto de la slava alfabeto (826—869)

«Nudaĵ estas sen libroj ĉiuj popoloj».

KONSTANTIN PRESILAVSKI,
bulgara verkisto, X jc.

«La ĉevalon regas la brido kaj la senpekan homon —
la libro. Oni ne povas konstrui ŝipon sen najloj, nek
estas ebla senpekulo, kiu ne legas librojn. Soldaton
distingas la armilo, ŝipon — la veloj kaj la bonan ho-
mon — libroligado».

El la Dua Kolekto de
caro SIMEON (864—927)

«... La manoj de tiu, kiu skribas, esti-
ĝos polvo, sed la skribitaj vortoj, kvankam krudaj,
estas vivaj paroloj, kaj ili restos eterne...»

Joasaf BDINSKI,
kleriko kaj verkisto,
la dua duono de XIV jc.

«Ho bulgaro, ne lasu ke oni trompu Vin, sciu Vian
devenon kaj lingvon kaj lernu en sia lingvo!»

Paisij HILENDARSKI,
unua ideologo de la bulgara Renesanco,
aŭtoro de „Historio Slavbulgara“, 18 jc.

La bogomilismo — kontribuo al la spirita kaj sociala evoluo de Eŭropo

Doc. NIKOLA SREBROV



Dum la Mezepoko en Eŭropo aperis socialaj religiaj movadoj kun klare esprimitaj streboj al justa ordo en la mondo. Inter tiuj movadoj, sendube, unuan lokon okupis la bulgara bogomilismo.

La bogomilismo datigas de la mezo de la X-a jc, post adopto de la kristanismo kiel oficiala ŝtata religio, kaj post establo de feŭda sistemo kun ĉiuj propraj al ĝi malakordoj. En la socio, dividita en privilegian klason kaj nesendependan kamparanan loĝantaron, ekestis fortaj kontraŭdiroj. Desur la preĝeja ambono kaj per ekleziaj libroj estis predikata subigo al la neŝanĝebla soci-politika ordo. En tiaj cirkonstancoj en la bulgara mezepoko la kuraĝa kaj originala pensulo popo Bogomil komencis aŭdacan predikadon.

Popo Bogomil vivis dum la regado de la bulgara caro Petar (927—969), en tempo de gravaj internaj konfliktoj. Li unua komencis prediki herezon en Bulgario. Pri popo Bogomil kaj pri kelkaj inter liaj disĉiploj — Mihail, Dobri, Stefan, Teodor — estas menciite en la Kolekto de Decidoj de la Supera Eklezia Konsilio, titolita „Sinodiko de Boril“; en ĝi svarmas la kruelaj anatemoj.

La neordinara por sia tempo kriticismo kaj la sobra rezonado de la bogomilanoj malakceptas plurajn ritojn kaj fetojn, al kiuj la Eklezio atribuas sendisputan gravecon. Rilate al la kredo, ke la vino kaj la pano sin transformis al karno de Jesuo Kristo, la bogomilanoj asertas, ke en la nutraĵo ekzistas nenio

sankta. Por ili la akvo estas ordinara likvaĵo kaj la meso — stulta babilado.

Kulmino de la bogomilismaj konvinkoj estas la aserto, ke la pastroj estas nenecesaj kaj ke ĉiu kredanta homo povas sola legi la evangelion kaj ekspliki al si ĝian tekston.

En spirito de la frukristana etiko la bogomilanoj konsideras la amon al la homo kiel ĉefan postulon kaj ribelas kontraŭ perforto, sangoverŝo kaj militoj, tiel detruigaj en la mezepoko.

La specifa bulgara doktrino — la bogomilismo — restis ne nur en Bulgario. Ĝi baldaŭ disvastiĝis al fremdaj landoj kaj popoloj, liverante al ili novajn konceptojn. En la XI-a jc ĝi penetris en Anatolion (Malgrand-Azio) kaj en Buzancan Tracion. En la XII-a jc ĝi atingis najbaran Serbion, kie la regionestro Stefan Nemanja kunvokis Popolan Konsilion por reziti kontraŭ la „herezuloj“. La Konsilio verdiktis gravajn punojn kaj persekutojn.

Precipe fortan influon la bogomilismo havis en Norda Italio. En la XII—XIII jc ĝi penetris inter la t.n. „kataroj“. La bogomilismo kaj la katarismo havis konsiderindan parencecon inter si pri filozofiaj demandoj kaj socialaj-etikaj rilatoj. Pri la ligo, ekzistinta inter ambaŭ doktrinoj, parolas la fakto, ke en siaj predikoj la kataroj adoptis kaj uzis bulgarajn bogomilismajn verkojn. Menciindas inter ili la konata „Sekreta Libro“ kaj la „Evangelio de Johano“ — la plej gravaj bogomilismaj apokrifoj.

La bogomilismo penetris ankaŭ en Sudan Francion, kie aktivis ideologie proksimaj al la bogomilismo dualistoj, nomataj „albianoj“ (laŭ la nomo de la franca urbo Albi). La opoziciantoj al la katarismo tre bone sciis, ke la opio venas el Bulgario, kaj ke ĝi estas nome la bogomilismo.

Ne nur en Italio kaj Francio la bogomilismo trovis fekundan grundon. En kronikoj de monaĥoj, en aktoj pri inkvizicio kaj en polemikaj verkoj troveblas informoj pri dualismo en Germanio, Britujo, Katalonio, Hungario. Spurojn de bogomilismo oni trovas ankaŭ en la rumana folkloro. La „bulgara herezo“ invadis ankaŭ la rusan teron.

Pluraj fontoj pri bogomilismaj konceptoj al multaj landoj permesas al ni konkludi, ke la faro de popo Bogomil kaj de liaj disĉiploj estis ne nur strikte enlanda fenomeno, sed movado en internacia skalo, kiu pruvas la bulgaran kontribuon al la evoluo de la ideologiaj konceptoj en Mezepoka Eŭropo.

★ heroo ★ pasinteco

Hristo KARPAČEV — FLAMA POETO KAJ BATALANTO

(OKAZE DE LA 70-a DATREVENO DE LIA NASKIĜO)



«La sorto de Hristo Karpačev estas la sorto de miloj da popolaj gefiloj, kiuj akceptis la idealojn de la komunismo kaj dediĉis al la batalo por venko de la socialisma revolucio siajn entuziasmon, fortojn, volon kaj talenton.

Hristo Karpačev estis fidela filo de nia partio — partopreninto en milit-konspiro, juĝita kaj jetita en malliberejon, sekretario de la partia komitato en Loveĉ, konspira organizanto kaj komandanto de Loveĉ-Trojana partizana taĉmento. Li posedis ĉiujn trajtojn de organizanto kaj aktivulo, de kuraĝa revoluciulo kaj gvidanto.

Per siaj poezia verkaro kaj heroo morto Hristo Karpačev viciĝis en la falangon de niaj senmortaj kreantoj. Kiel Botev — per armilo kaj plumo — li aktive partoprenis en la glora batalo por sociala libereco. Liaj poemoj «Septembranoj» kaj «Ĉavdaranoj» estis la unuaj marŝoj de la batalantoj por nova mondo kaj la unuaj entuziasmaj himnoj de la venkinta Naŭsep-embra revolucio. . . »

TODOR JIVKOV

Ĝenerala sekretario de CK de BKP
Kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto
de Popola Respubliko Bulgario

Jam delonge la nomo de Hristo Karpačev estas enskribita en la oran libron de la herooj-batalantoj por liberigo de Bulgario elsub la jugo de l'faŝismo kaj kapitalismo.

Naskita la 26-an de julio 1911 en vilaĝo Nadejda (nun Karpačevo), distrikto de Loveĉ, ekde siaj junulaj jaroj Hristo Karpačev eniras la vicojn de la kuraĝaj batalantoj por nova sociordo, vivas la aktivan kaj maltrankvilan vivon de konspira partia funkciulo. Li senlace propagandas la ideojn de l' socialismo kaj de la sociala revolucio kaj altiras al la vicoj de la batalantoj novajn kaj novajn adeptojn. Arestita de la polico pro lia kontraŭleĝa komunista agado kaj propagando, li estas

juĝita je 12 jaroj da malliberigo. Post amnistio komenciĝas periodo de eksterleĝa agado en la distrikto de Loveĉ, kie li organizas partizanan taĉmenton kaj reton de partizanhelpantoj. Samtempe Karpačev ne ĉesas verki poezion, inspiritan de liaj revoluciaj ideoj. Serĉata de la polico, li forlasas sian naskiĝvilaĝon kaj ekstaras fronte de la partizana taĉmento en la regionoj de Loveĉ kaj Trojan. Sub lia gvidado la partizanoj efektivas multajn sukcesajn militoperaciojn, kuraĝigante la loĝantaron kaj plifortigante ĝian fidon en la justa kaŭzo de la Bulgara Komunista Partio. La milit-herooj kaj la arda verkaro de Karpačev rapide faras lin populara en la tuta lando.

En kruela batalo kun ĝendarmoj kaj policanoj, la 23-an de majo 1943 pereis la fidela filo de la partio kaj de la bulgara popolo — la flama poeto-partizano Hristo Karpačev, kies verkaro kaj heroo vivo estos eterne vivaj kaj inspiras la estontajn generaciojn.

Omage al Hristo Karpačev, je lia nomo estis fondita Nacia literatura premio, kies unua laŭreato estiĝis alia eminenta bulgara poeto-partizano — Dobri Jotev. Ĉiun duan jaron la premion «Hristo Karpačev oni aljuĝas al bulgaraj kreantoj pro verkoj je temoj pri la revolucia batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, pri la konstruado de l'socialismo en Bulgario.

ĈAVDARANOJ

(MARŜO DE LA PARTIZANOJ EL LA REGIONO DE LOVEĈ)

La lando de Botev kaj Levski
denove sklavecas ĉi land'.
Balkano komencis jam kanti
la kantojn hajdutaĵn sen halt'.
Kiu amas popolon premitan
kaj gardas ideon mem ja
de Levski ideon ribelan —
ĉe ni li alvenu soldat'.
Ministroj vendadas popolon,
ĝendarmoj pendigas nin jam.
Ni levu alarme popolon
viktimoj nin vokas kun flam'.
Popola turmento bruligis
hajdutan fajregon en sang'.
Ni tial standardon flirtigas,
ĝin kiel flirtigis Ĉavdar.
Kun Botev'a flam' en batalo,
de Levski fortega spirit'
ni serĉas batalo repagon
kaj ĉenojn detruas jam ni.
Kiu amas popolon premitan
kaj gardas ideon mem ja
de Levski ideon ribelan —
ĉe ni li alvenu soldat'.

Tradukis: ASEN G. MATE

D-RO PANAJOT HITROV—PASIA E-PROPAGANDISTO



P. Hitrov — gimnaziano

Okaze de la 100-jariĝo de gimnazio „Kiril kaj Metodij“ en Veliko Tarnovo (majo 1980) unu el ĝiaj edukitoj prof. Nikolaj Iribagakov en sia salutparolado memorigis la E-tradiciojn de la gimnazio. La lerneja muzeo ekspoziciis afiŝon anoncanta pri referaĵoj de la verda semajno (22-28. III. 1938) fare de la gimnazianoj: Varban Genčev — „Esperanto kaj estonteco“, Dimitar Nojkov — „Esperanto en la mondo“, Angel Belčev — „Esperanto, la lernanto, la komerco“.

La E-tradicioj de la fama gimnazio en V. Tarnovo estas ligitaj kun la nomo de Panajot Hitrov (1891—1945) — elstara figuro de la E-movado, kies nomo transiras la limojn de Bulgario.

Li naskiĝis la 18-an de septembro 1891 en la malnova bulgara ĉefurbo V. Tarnovo, kie li finis gimnazion. Eksterordinare inteligenta knabo, sprita, inventema, muzikema kaj ŝatanta la pentroarton, jam kiel lernanto li interesiĝis pri lingvo Volapük, sed ellerninte ĝin li esperantistiĝis sub influo de la tiamaj esperantistoj Georgi Aktargiev el V. Tarnovo kaj Hristo Rjahovski el Levski.

En lia E-agado oni distingas tri periodojn. La unua (ĝis la Unua Mondmilito) prezentas lin kiel aktivan bulgaran esperantiston (amasa propagando de Esperanto inter siaj samgimnazianoj, partopreno en naciaj E-kongresoj, en la rumana E-kongreso — 1909). Certan tempon en Sofio (kunloĝanto de Iv.

Krastanov) li ĝuis la etoson de l'aŭtoritato inter la balkana esperantistaro tiutempe, klera rusa esperantisto Nikolaj Evstifeev, kiun li konsideris „fonto de scioj“. La kulminon de lia E-agado ĉi-periodo prezentas la eldono de „Junulo“ (1909) — senpaga E-jurnaleto, kiu celis propagandon de Esperanto inter la junularo kaj fondon de Bulgara junulara E-organo.

Post la milito Panajot Hitrov forveturis Germanion. Laborante, li samtempe studis tie medicinon. Dum tiu dua eksterlanda periodo ĝis 1935 (Berlino, Lejpcigo, Moskvo, Romo) lia E-agado estis tre fruktodona. En Germanio li skribis E-artikolojn en la tiea gazetaro kaj eldonis 13 librojn (i.a. la tre popularan „Mia amiko“ — 1922). Ankaŭ en Germanio P. Hitrov estis fondinto de „Universala Unio Esperantista“, kiu havis la devizon „Libero, Laboro kaj Paco“. Per E-to tiu Unio devis helpi kaj subteni mal-sajnajn kaj malriĉajn amikojn, kiel ankaŭ fondi internacian kulturon kun oficiala lingvo Esperanto. Tiucele Panajot Hitrov eldonadis dum tri jaroj (1923—1925) ilustritan revuon por arto kaj scienco „Esperanto“, la libron „Internacia Unio Esperantista — ĝiaj celo kaj agado“ (1925), kaj la organon de „Internacia Unio Esperantista“ — „Esperantisto“ (1928). La germana periodo de lia E-agado postulas pristudojn kaj tiurilate ni fidos niajn germanajn amikojn.

Panajot Hitrov multe vojaĝis. En Saratov li vidis la plej riĉan bibliotekon de Georgi Davidov kaj skribis plenan bibliografion de la plej fruaj bulgaraj E-eldonaĵoj. Menciindaj estas liaj vizitoj ĉe la familianoj de Zamenhof kaj ĉe alilandaj esperantistoj. Li intencis verki specialan libron pri „Psikologio de l'esperantisto“.

La lastan (trian) periodon de sia agado d-ro Panajot Hitrov dediĉis al V. Tarnovo, kien li revenis kiel profesia kuracisto. Krom siaj medicinaj okupoj li estis iniciatinto de kulturaj kaj E-arangoj en la urbo. (i.a. li faris publikajn paroladojn pri Lev Nikolaevič Tolstoj). Vasil Siŝkov, d-ro Hitrov kaj d-ro Nedkov atentigis la loĝantaron pri la utileco de E-to. La historia urbo povus profiti multon, se la urbestro helpus iliajn iniciatojn (Gvidlibro en E-to, Internacia E-muzeo, Multspeca loka muzeo, Komitato por propagando de la urbo per E-to). Ambaŭ kuracistoj, d-ro Hitrov kaj d-ro Nedkov, havis multe da zorgoj pri la historiaj valoroj de la malnova bulgara ĉefurbo V. Tarnovo.

La emo pri historio montrigis ĉe Panajot Ĥitrov de plej junaj jaroj. Dank'al sia taglibro, kie li priskribis siajn travivaĵojn kaj eltrovaĵojn, li publikigis interesajn artikolojn en la gazetaro. Al la plumo de Panajot Ĥitrov apartenas libro verkita okaze de lia 35-jara esperantistigo. Ĝia titolo estas „Esperanto kaj la vivo de esperantisto“ — Sofio, eldonejo „Hudojnik (Pentristo) — 1939. Ĉi tiu malgrandformata 56-paĝa libreto estas necesa por ĉiu historiisto de Bulgara E-movado. Amiko de Ilia Zlatev kaj de ties patro Nikola Zlatev — konata apotekisto, eksvolapukisto, kiu esperantistigis kaj fondis la lokan E-societon „Fulmo“ en 1891, Panajot Ĥitrov havis fidindajn informojn pri la unuaj paŝoj de la E-movado en la urbo. La libro de P. Ĥitrov estas la sola fonto pri Vasil Drumev (Mitropolit Kliment) — fama bulgara renesanca aganto, verkisto kaj kleriko, kaj ankaŭ volapukisto, kiu poste esperantistigis. Estante arda rusamanto, li estis persekutata de politikaj malamiko, pro kio li ne povis disvolvi la E-agadon. Tion Panajot Ĥitrov tre bedaŭris. Tamen dank'al P. Ĥitrov en la personeco de V. Drumev la bulgara esperantistaro havas indan reprezentanton de sia nacio en la tutmonda movado por internacia lingvo.

En la supre menciita libro Panajot Ĥitrov kolektis multe da eldiroj pri Esperanto de bulgaraj kaj alilandaj eminentuloj. Li faris liston de



Manskribita E-jurnalo
de P. Ĥitrov

pli ol 100 konataj bulgaroj-adeptoj de Esperanto, liaj samtempuloj.

Do, la E-agado de Panajot Ĥitrov estas grandega, pro kio ĝi meritas profundan estimon de ties posteuloj.

OLGA CANKOVA

SOFIAJ ESPERANTISTOJ PRIDISKUTAS REVUON «BULGARA ESPERANTISTO»

Sekvante la jam starigitan depost jaroj bonan tradicion, la membroj de la sofia urba E-societo „Maksim Gorki“ en du sinsekvaj kunvenoj (la 14-an kaj 21-an de oktobro ĉi-jare) pridiskutis la asocian organon „Bulgara Esperantisto“.

En sia enkonduka raporto la ĉefredaktoro de la revuo **Donĉo Ĥitrov** parolis pri la ĉefaj direktoj de la redaktado de „BE“. Li substrekiis, ke la redakta komitato, konsistanta el spertaj profesiaj ĵurnalistoj kaj lingvistoj, zorgas respeguli la plej gravajn soci-politikajn eventojn en nia lando kaj mondscale, samkiel la batalon por paco kontraŭ la neniigaj armiloj; la evoluon de la landa kaj monda E-movado; la kultur-klirigan, lingvan kaj klean aktivecon de bulgaraj kaj fremdlandaj geesperantistoj; la problemojn de la E-junularo. La ambicio de la redakcio estas fari revuon „Bulgara Esperantisto“ riĉenhava, profesie arte aranĝita revuo, en kiu ĉiu leganto povus trovi legindan materialon, ne forgesante ankaŭ la plej

junajn — niajn „verdajn steletojn“, al kiuj la revuo dediĉas specialan rubrikon. La redakcio strebas plibonigi la lingvan nivelon de la materialoj kaj la lingvan scion de la legantaro, publikigante materialojn de spertaj bulgaraj kaj fremdlandaj esperantologoj, samkiel paralelajn tekstojn (bulgarajn-esperantajn). La redakcio sekvas la jam starigitan tradicion de literaturaj konkursoj kaj de publikigo de originale verkitaj materialoj en Esperanto, samkiel de tradukitaj verkoj — rakontoj, versaĵoj ktp. de bulgaraj kaj fremdlandaj aŭtoroj. La enkonduko de novaj rubrikoj (sporto, kuirarto, modo k. a.) celas la pliriĉigon de la enhavo kaj alproksimigon de la revuo al la moderna vivo. La redakcio faras ĉiujn necesajn paŝojn por plibonigi la kvaliton de papero kaj de presado de la revuo, por plialtigi ĝian eldonkvanton kaj amplekson. Ĝojiga fakto estas, ke la intereso al nia revuo enlande kaj eksterlande plivigliĝis kaj la

eldonkvanto de ĉiu aparta kajero rapide elĉerpigas. Pri tio kontribuis ankaŭ la agado de la perantoj de la revuo en pli ol 15 landoj. La redakcio havas la noblan ambicion vicigi revuon „Bulgara Esperantisto“ inter la plej bonaj kaj interesaj E-periodaĵoj en la mondo.

— Tutcerte — diris **D. Ĥitrov** — ĉio-ĉi ne povas elĉerpi la strebojn de la redakta komitato pri senĉesa plibonigo de nia asocia organo kaj pri pliigo de la vicoj de kunlaborantoj, kies kontribuoj estas garantio pri sukceso.

La pridiskutadon partoprenis kelkaj el niaj elstaraj esperantistoj-jurnalisto kaj lingvistoj-esperantologoj: **prof. Stojan Ĝuĝev, Violin Oljanov** — ĉefredaktoro de revuo „Paco“, **Nikola Aleksiev, Simeon Hesapĉiev, Asen Grigorov, prof. Vasil Ĉoĉov, Cano Ignev** — prezidanto de E-societo „M. Gorki“, k. a.

En siaj aŭtoritataj eldiroj ili esprimis spertajn konceptojn pri planado de materialoj, pri la enhavo kaj arango de la revuo ĝenerale; faris gravajn rimarkojn el vidpunkto stilistika, lingvistika, gramatika; esprimis sugestojn al la redakta komitato pri enkonduko de novaj interesaj rubrikoj, pri plivastigo de la rilatoj de nia revuo kun alilandaj E-periodaĵoj kaj pri la altiro al kunlaborado de elstaraj fremdlandaj esperantologoj kaj aŭtoroj. Tiucele **S. Hesapĉiev** atentigis la redaktan komitaton pri iuj malagrablaj preseraroj en la korektado kaj en la transskribo de propraj nomoj. **Prof. Ĝuĝev** esprimis sian kontenton pri la revuo kaj per flataj vortoj vicigis ĝin inter la plej interesaj E-periodaĵoj. Li substrekis, ke ni ne devas esti maksimalistoj, ĉar, liaopinie, la variceco de nia revuo estas kontentiga. Ni devas turni atenton al la lingva kaj teknika plibonigo, ne farante tamen la revuon tro populara konekse kun la traktado de lingvaj problemoj, ĉar nia movado estas laŭnature lingvistika. Aliflanke, „B.E.“ ne devas imiti la tagjur-

nalojn — ĝi devas havi sian specifan aspekton. La saman opinion esprimis ankaŭ **A. Grigorov**, proponinte organizi enketon kun la legantoj pri iliaj preferoj kaj enkonduki rubrikon „Tra la leteroj“. Aprobinte la evidentan plibonigon de „BE“, li rekomendis pli regulan aperigon de paralelaj tekstoj. **Violin Oljanov** analizis n-ro 6 de 1981, kaj difinis ĝin precipe informa. Li postulis pli detalajn informojn kaj nepre komentariojn, problemajn materialojn. **V. Oljanov** kritike tuŝis ankaŭ lingvajn problemojn per konkretaj ekzemploj de la sama n-ro de „BE“ kaj rekomendis lingvistikajn materialojn por malpli spertaj esperantistoj. **Nikola Aleksiev** profunde kaj profesie analizis la ĉi-jarajn numerojn de „BE“, konsiderante, ke la redakcio sukcese plenumas siajn ĉefajn taskojn kaj sekvas la aprobitan de CE de BEA teman linion. Li rekomendis ne trouzi superlativojn kaj realisme pritaksi eventojn kaj faktojn. Kiel sperta profesia ĵurnalisto, **N. Aleksiev** proponis ege valorajn praktikajn ideojn pri plua redaktado kaj art-teknika arango de la revuo, pri kontaktoj kaj kunlaborado kun la aktivularo de la revuo. Laŭparolojn pri „BE“ direktis ankaŭ **prof. Ĉoĉov, N. Abaĝieva, N. Nikolov, C. Ignev**. Ili esprimis komprenon pri la malfacilaĵoj, kiujn la redakcio havas en sia laboro kaj faris utilajn proponojn pri la redaktado, pri ĝusta pritakso de sociopolitikaj, neesperantaj kaj esperantaj materialoj. Kaj antaŭ ĉio — la revuo devas esti interesa por ĉiuj!...

En la nomo de la redakcio **D. Ĥitrov** dankis al ĉiuj pro iliaj valoraj kaj konkrete praktikaj eldiroj kaj esprimis la esperon, ke per la helpo de la legantoj kaj la aktiva agado de la korespondantoj „Bulgara Esperantisto“ plibonigos siajn lingvon kaj enhavon kaj sukcese plenumos la noblajn kaj respondecajn taskojn de organo de Bulgara Esperantista Asocio.

MERITA DISTINGO

Kun ĝojo ni legis en ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ de 13.10.1981, ke en la fonduson „1300 jarojn Bulgario“ estas ricevitaj personaj dokumentoj de la popola aganto de arto kaj kulturo **DIMITAR ZLATARSKI** el urbo Dalgopol, kiuj spegulas lian multjaran aktivadon kiel arkeologo, natursciencisto, etnografo, popola instruisto. **D. Zlatarski** estas fidela adepto de Esperanto kaj elstara E-poeto.

Pro lia multjara sindona laboro en la kampo de la kulturo kaj Scienco, la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis lin per la alta titolo Popola aganto de la kulturo. Korajn gratulojn!

IMITINDA EKZEMPLO

Jam delonge inter esperantistoj el la bulgara urbo Pazarĝik kaj la itala urbo Bolonjo (Bologna) ekzistas amikaj perleteraj kontaktoj. Plej vigla estas la korespondado inter nia samklubano **Petko Arnaudov** kaj la itala samideano **Mario Amadei**. Iliaj personaj kontaktoj ĉiam pli ofte tuŝis ankaŭ sociajn problemojn. Rezulto de tiu perleteraj amikeco kaj kunlaboro estis la speciale organizita ĝenerala kunveno de E-societo „Radio“ en Pazarĝik, dediĉita al la itala urbo Bolonjo. Kun intereso kaj plezuro la ĉeestantoj aŭskultis la sonbendigitan mesaĝon de la esperantistoj el Bolonjo.

Teori-praktika seminario por E-korespondantoj

Konsiderante la viglan evoluon kaj disvastigon de E-movado mondscale kaj enlande kaj lige kun la decidoj de XII Kongreso de BKP, la CE de BEA en sia Plenkunsido en junio j.k. pritaksis la neceson de plua profesia, politika kaj kultura plialtigo de la sperto de korespondantoj de la E-gazetaro.

Nur semajnon antaŭ la Kongreso de Unuiĝo de bulgaraj ĵurnalistoj la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio por la unua fojo en la historio de la bulgara E-movado organizis seminarion por korespondantoj-esperantistoj.

Laŭ invito de la iniciatemaj esperantistoj el Plovdiv, je la 24-a kaj 25-a de oktobro ĉi-jare la seminario okazis en la suda ĉefurbo de nia lando.

En la antaŭtago de la seminario estis organizita gazetara konferenco, kiun partoprenis ĵurnalistoj el la distrikta gazeto „Oteĉestven Glas“, el Radio Plovdiv, el la filio de Bulgara Televido en Plovdiv kaj korespondantoj de centraj gazetoj en la distrikto de Plovdiv. Donĉo Hitrov, respondeculo pri la seminario kaj ĉefredaktoro de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“, detale informis la ĉeestantajn ĵurnalistojn pri la E-movado en Bulgario kaj en la mondo kaj pri la celoj de la seminario. Liaj informoj provokis viglan intereson kaj multajn demandojn flanke de la partoprenantoj.

La seminarion partoprenis pli ol 100 personoj — la plej aktivaj kaj sindonaj korespondantoj kaj kunlaborantoj de la bulgara kaj internacia E-gazetaro. Dank' al la agemo de la dommastroj — la Distrikta estraro de BEA kaj E-societo „Todor Sofroniev“, al la partoprenantoj estis disponigitaj plej favoraj kondiĉoj por rezultodona laboro.

En la salono estis korespondantoj-aktivuloj el preskaŭ ĉiuj partoj de la lando, membroj de la redakciaj komitatoj de la bulgaraj E-gazetoj kaj revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Pacaktivulo“, „Interligilo“, „Kolektanto“, „Internacia Ĵurnalist“, „Bulgara Fervojisto“, „Scienca Mondo“, „Filologo“, „Agrara E-bulteno“, reprezentanto de la amaskomunikiloj en Plovdiv k. a.

Fani Mihajlova, sekretariino de DE de BEA, per varmaj salutvortoj en la nomo de la esperantistaro en Plovdiv bondeziris al la ĉeestantoj sukcesan laboron kaj deklaris la seminarion malfermita.

La programo de la seminario implicis kelkajn bazajn teori-praktikajn raportojn, kiuj traktis diversspecajn problemojn de la ĵurnalista laboro kaj laŭ sia karaktero prezentis koncizan kurson pri ĵurnalismo.

En la nomo de CE de BEA kaj de ties prezidanto Hristo Gorov, la sekretario de BEA DIMITAR PAPAŬOV faris la unuan raporton, en kiu li profunde analizis la decidojn de XII Kongreso de BKP lige kun la taskoj de la E-korespondantoj pri ĝusta traktado de organizaj kaj kultur-klerigaj problemoj en la diversspecaj materialoj.

ESPERANTO-GAZETARO EN SERVO DE LA PACO!



Partoprenintoj en la seminario



N. ALEKSIEV

D. PAPAŖOV

D. HITROV

H. LEVI

KR. KARUCIN

La raporto de DONCO HITROV — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, traktis la problemojn pri senĉesa plialtigo de la nivelo de soci-politikaj konoj, ĝenerala kulturo kaj profesia sperto de la korespondantoj de nia E-gazetaro. En la dua parto de sia raporto la preleganto atentigis la ĉeestantojn pri demandoj lige kun ilia konkreta praktika korespondlaboro, pri la postuloj al la korespondantoj el vidpunkto de stilo, ĝusteco kaj respondeco. Specialan atenton D. Hitrov turnis al la kunlaborado de niaj E-korespondantoj al la neesperantistaj gazetoj kaj revuoj.

Tre interesa kaj valora estis la raporto de la honora prezidanto de MEM kaj Heroo de la Socialisma laboro de PR Bulgario — la veterana ĵurnalisto NIKOLA ALEKSIEV pri kunlaborado al la eksterlandaj amaskomunikiloj. Li ankaŭ substrekiis la noblan agadon kaj la gravan respondecon de la korespondantoj, kiuj kunlaboras al fremdlandaj gazetoj, ĉar per Esperanto ili prezentas al la mondo la bildon de nia socialisma lando kaj propagandas la akiraĵojn de nia laborema popolo en la socialisma konstruado.

La unua tago de la seminario finiĝis per vigla diskuto de la raportoj, kiuj provokis multajn eldirojn kaj demandojn pri teoriaj, lingvaj kaj praktikaj problemoj. Interesa estis la propono de la veterana ĵurnalisto-esperantisto Krastju Sofroniev el Plovdiv — klopodi ĉe respondecaj instancoj pri restarigo de la iama praktiko de nia progresema gazetaro publikigi pagojn aŭ rubrikojn kun materialoj en Esperanto. Por atingi pli vastan kaj efikan rezulton en la propagando de E-o en nia lando, K. Sofroniev ankaŭ proponis la eldonadon de bulgarlingva perioda prespropagandilo.

En vere amika kaj agrabla etoso pasis la „Vespero de la korespondanto“, organizita de la dommastroj, dum kiu la E-korespondantoj renkontiĝis kaj konatiĝis kun kolegoj el la amaskomunikiloj en Plovdiv.

La sekvan tagon la partoprenantoj en la

seminario aŭskultis la raporton de HAIM LEVI — vicĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, en kiu li analizis la plej gravajn kaj plej ofte uzatajn ĵurnalismaĵajn ĝenrojn, kio certe estos utila por niaj plej junaj kunlaborantoj. La veterana ĵurnalisto-esperantisto kaj membro de la Buroo de CE de BEA KRĀS-TJU KARUCIN per konkretaj ciferoj kaj donitaĵoj analizis la kunlaboron de niaj korespondantoj el diversaj distriktoj kaj lokoj de la lando al nia esperantista kaj neesperantista gazetaro dum la lastaj tri jaroj. Tiu ĉi analizo, rezulto de obstina kaj temporaba pristudo, nepre instigos al pli vigla kunlaborado.

La raportoj en la programo de la seminario provokis tre viglan partoprenon de la ĉeestantoj, kiuj serioze kaj celkonforme diskutis la starigitajn problemojn kaj faris multajn valorajn konkretajn proponojn pri la plibonigo de niaj E-revuoj, pri la zorgema redaktado de iliaj korespondantoj, pri lingvaj problemoj, k.a.

Ce la fermo de la seminario, en la nomo de CE de BEA kaj de la redakcioj de niaj E-gazetoj kaj revuoj, la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Donco Hitrov esprimis koran dankon al la dommastroj pro ilia gastamo kaj helpo. Li donacis valorajn E-librojn al la plej malnovaj kaj aktivaj korespondantoj de la asocia organo kaj de aliaj E-periodaĵoj kaj enmanigis al la kunlaborantoj de „Bulgara Esperantisto“ ĵurnalistajn kartojn.

Ni esperas, ke la okazinta unua teori-praktika seminario por E-korespondantoj en Plovdiv estos rezultodona; ke ĝi instigos la partoprenantojn al pli aktiva kaj pli altnivela kunlaborado al nia esperantista kaj neesperantista gazetaro, kaj ankaŭ ilian kontribuon al la popularigo de nia socialisma patrolando per Esperanto en la eksterlanda E-gazetaro.

Al vigla kaj inspirita ĵurnalisma agado, karaj E-korespondantoj!

Plovdiv—Sofio,
oktobro, 1981

RADI BANĈEVSKI

JUNA ESPERANTISTO

TEJO-KONGRESO EN MEKSIKIO



37a INTERNACIA
JUNULARA KONGRESO
de TEJO, Oaxtepec
1981 07 10 - 17

La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso estis escepta el multaj vidpunktoj. Estis la unua fojo, ke TEJO kongresas en Ameriko. Arangis la kongreson Landa Sekcio, kiu ĝis nun apenaŭ estis konata en la Movado. La kongresa temo estis „la infano kaj Esperanto“, sed la „movada“ temo efektive estis „Ĉu TEJO ekzistas ekster Eŭropo?“ — demando, kiu estis serioze kaj sincere traktita en publika debato dum TEJO-vespero, unu el la plej sukcesaj, kiujn mi memoras. Multoblan respondon al tiu

demando provizis la Kongreso mem. Unue, kvankam ĝi estis for de Eŭropo, la 108 partoprenantoj el 19 landoj kaj la kutima internacia etoso pruvis, ke eĉ la oceano ne estas barilo sufiĉe alta por ke niaj gejunuloj rezignu viziti la Internacian Junularan Kongreson. Due, montriĝis, ke la meksikaj gejunuloj kaj la gastoj el trans la oceano tute harmonie interrilatis, kunlaboris kaj distrigis.

Plej valora estis la aktiva partopreno de la meksikaj esperantistoj en la publika debato pri varbado kaj informado pri Esperanto ekster Eŭropo. Trie, kiel emfazas la rezolucio de la kongreso, la sukcesa okazigo de la IJK en Meksiko estis plia paŝo al internacia TEJO, sekanta la vigligon en la rilatoj inter TEJO kaj la japana kaj korea Esperanto-movadoj, kaj sekvota — espereble — de simila vigligo en Latina Ameriko, post la Universala Kongreso en Brazilo.

Simbola en tiu rilato estas la granda Esperanto-flago, kiun la LKK donacis al TEJO, kaj dum la ferma ceremonio transdonis al la reprezentanto de la venontjara IJK. Ni esperu, ke la landoj de la estontaj kongresoj, brodataj sur la flagon, konsistigos tutmondan mozaikon!

AMRI WANDEL,

«Esperanto», septembro, 1981

NIAJ JUNULARAJ SEMINARIOJ

STUDADO KAJ AMUZO

Ili estiĝis jam tradiciaj arangoj: la Junularaj Seminarioj de CLE, Ekde pluraj jaroj la junuloj el Germana Demokratia Respubliko ĉiujare kunvenas por studi kaj amuziĝi, por interŝangi spertojn. Niaj JuSem hodiaŭ prezentas altvaloran alojon. La edukado de junaj, spertaj funkciuloj estas unu deviga tasko de ĉiuj organizoj. Dua tia tasko estas la disvastigo de bazaj konoj pri lingvo kaj movado al niaj plej novaj, tute senspertaj amikoj. La JuSem servas kaj por la unua kaj por la dua taskoj. El tiu kunligo naskiĝas menciinda rezulto: La senpera transdono de la spertoj de longjaraj esperantistoj al komencantoj kaj alidirekte la informado pri motivoj kaj celoj de la konatiĝo kun Esperanto fare de tiuj, kiuj nun lernas la lingvon. Sekve de tio dis-

kutoj kaj malformalaj interparoloj estigas gravajn punktojn en la programo de la JuSem.

Ekster tiu riĉa programo troviĝas tempo eĉ por kantado, ekskurso, vespera amuzado kaj dancoj.

Iuj eble nomas ĝin dorlotado. Por aliaj ĝi estas memkompreneblaĵo. En mia lando ĝi estas parto de la junulara politiko, ke tiuj seminarioj okazas sub la plej bonaj kondiĉoj, ke la partoprenantoj pagas por tiu unu semajno nur malaltan kotizon kaj ricevas la vojaĝ-kostojn.

Ni ne ofte parolas aŭ skribas pri niaj junularaj seminarioj. Sed ili ĉiam meritas esti menciataj kiel firma elemento de nia esperantista porjunulara laboro.

MICHAEL LENNARTZ

„DORMUĈAMBRO, LEGELIBRO?!“

Sub tiu ĉi titolo estas publikigita en *Budapeŝta Informilo* (3/1981) artikolo de Tibor Papp. La artikolo estas respondo al mia artikolo „Pri la kunmetitaj vortoj“ en *Bulgara Esperantisto* (9/1980), en kiu mi asertas:

1. La kunmetita vorto estas kombino de radikoj.

2. Kiam, pro la estiĝinta kombinaĵo, la prononco malfaciliĝas, inter la radikoj oni enŝovas vokalon.

3. Tiu vokalo havas nek semantikan, nek gramatikan signifon. Ĝi estas nur belsoneca ornamo.

4. Pri la ornamo, ekzistas nur unu leĝo: plaĉo. Do, al la demando, kiu devas esti la belsoneca vokalo de tiu aŭ alia kunmetita vorto, la respondo devas esti: tiu, kiu respondas al la postuloj pri la belsoneco, do tiu, kiu plaĉas.

5. Sub plaĉo oni devas kompreni plaĉon al la kolektiva esperantistaro. Alivorte plaĉo al la praktiko, kiu estas plej supera prijuĝanto.

Tiuj asertoj estas por T. P. „perpleksigaj“. Pro kio?

1. ĉar „sur paĝoj de *Budapeŝta Informilo* kaj *Sciencaj Komunikadoj* aperis klarigo de kompetentulo, Kalman Kalocsay, krom *Lingvo Stilo Formo* kaj *Plena Gramatiko de Esperanto*“, kaj

2. ĉar pri tio ne konsentas „la lernitaj de mi lecionoj, per kiuj mi konkludas alimaniere pri la demando supre citita“.

Plue la aŭtoro klarigas, ke oni devas konkludi ne laŭ sia propra rezonado, sed laŭ la lecionoj, kiujn li lernis. Parenteze oni povas sin demandi, ĉu valoras publikigi en esperantaj revuoj lecionojn, kiujn oni povas trovi, kiel ĉi-okaze, en koncernaj verkoj?

Kion klarigas la aŭtoro T. P.?

1. La kunmetitaj vortoj, laŭ la aŭtoro, konsistas el vortoj. Ordinare la vortoj estas du: dekstra (ĉefelemento) kaj maldekstra (flank-elemento). Kiam la dekstra vorto estas substantivo, ankaŭ la maldekstra fariĝas substantivo.

Do, ĉe la kunmetita vorto, ekzemple, *vivpovo*, ĉar la dekstra vorto (povo) estas substantivo, la maldekstra (viv) fariĝas same substantivo, kaj, se ni deziras intermeti vokalon, ni devas meti la vokalon „o“.

2. Se la dekstra vorto estas adjektivo la maldekstra „ĉiam fariĝas substantivo“.

Do, ĉe, ekzemple, *vivpova*, ĉar la dekstra vorto (pova) estas adjektivo la maldekstra (viv) fariĝas substantivo, kaj se ni deziras intermeti vokalon, ni devas meti la vokalon „o“.

3. Se la dekstra vorto estas verbo, la maldekstra „povas esti ĉu adverbo, ĉu predikata atributo“.

Do, ĉe, ekzemple, *vivpovi*, ĉar la dekstra vorto (povi) estas verbo kaj la maldekstra (viv) „povas esti ĉu adverbo, ĉu predikata atributo“, se ni deziras intermeti vokalon, ni devas meti aŭ la vokalon „e“ aŭ alian vokalon, sed kiun — tion la aŭtoro ne klarigas. Krom tio la aŭtoro ne klarigas, kiukaze la maldekstra vorto fariĝas adverbo kaj kiukaze — predikata atributo.

4. „Kaze de adjektiva ĉefelemento estas permesite uzi la ligvokalon ĉu „a“ ĉu „o“, depende de tio, ĉu temas pri adjektiva flank-elemento aŭ ne“.

Iom antaŭe, kiel ni vidis, la aŭtoro formulis alian regulon, nome, ke se la dekstra vorto estas adjektivo, la maldekstra „ĉiam“ fariĝas substantivo. Fakte nun la aŭtoro ne formulas regulon. Li diras, ke „estas permesite uzi“, sed kiel ĝuste, se ekzistas regulo, antaŭe formulita, kiu preskribas alion?

5. „En la ekzemplo de verba ĉefelemento oni uzu la ligvokalojn aŭ „a“ aŭ „e“, depende de tio, ĉu tiel la vortkunmeto havas senco“.

Ankaŭ tiu ĉi aserto estas ne klarigo de regulo, sed nur rekomendo („oni uzu“). Tiu aserto estas interesa ankaŭ per tio, ke la aŭtoro forlasas la gramatikan terenon kaj alpaŝas al la semantika. Jam ne la reĝimo de dekstraj kaj maldekstraj vortoj validas, sed nur la senco. Kaj laŭ la senco oni devas difini ĉu la ligvokalo devas esti „a“ aŭ „o“.

Post la ĉi-supra rekomendo sekvas vico da aliaj: „povas esti metita“, „oni povas uzi ankaŭ“, „nenio nin baras uzi“, „estu uzataj“.

La klarigoj, evidente, fortimigos ne nur komencantajn, sed ankaŭ spertajn esperantistojn.

Kaj la plej interesa estas la konkludo, kie per unu frapo la aŭtoro neniigas la tutan klarigitan de li sistemon: „Kiu ligvokalo al kiu kunmetita vorto „konvenas“ — tion jam decidis la praktiko...“

Jes. Ne la klarigita sistemo, sed la praktiko. Tio estas la ĉefa ideo ankaŭ de mia artikolo. La praktiko, ekzemple, decidis, ke ni uzu ne dormuĉambro, dormiĉambro, dormeĉambro kaj dormaĉambro, sed dormoĉambro. Ne pro tio, ke la forĵetitaj formoj kontraŭas al la sistemo, klarigita de T. P., sed ĉar ili ne plaĉis al ĝi. Pro kio plaĉis al ĝi la vorto dormoĉambro estas alia demando. Ne nur ĝis nun, sed ankaŭ estonte praktiko estos la supera prijuĝanto pri elekto de kuniga vokalo ĉe kunmetitaj vortoj.

La kunmetitaj vortoj ne estas kunmeto de vortoj, sed de radikoj. Kaj pro tio la plej ĝusta nomo devas esti „plurradikaj vortoj“. Kuniĝo de radikoj devas fariĝi senpere — radiko kun radiko. Kiam tio malfaciligas la prononcon oni devas serĉi kaj trovi konvenan vokalon ne laŭ la sistemo, rekomendita de T. P., sed laŭ la postuloj pri belsoneco, kultivataj de la praktiko.

LJUBOMIR MIHAJLOV

REPLIKO

«NEOLOGISMA MAĈAJO»

Mi tralegis la artikolon de L. Miĥajlov (en „BE“ n-ro 2/81) „Pri la neologismoj“, kaj volus esprimi mian opinion pri la temo. La konkludo de s-ano L. M., ke neologismoj „malhelpas al solvo de praktikaj celoj“ estas bazita sur la premiso, ke ĉefa figuro en la solvo de la nunaj taskoj (taktikaj kaj eĉ strategiaj) en E-sfero estas la lernanto. Kaj, sekve, streboj de la tuta movado devas impliki meton de lingvo kaj movado kiel tapiŝon al la piedoj de la lernanta amaso, kiu plej rapide trakuru ĝin — kiel vojon de nescio al scio.

Cu tia prezento de niaj ĉefaj nunaj taskoj estas ĝusta? Mi ne pensas tiel.

Jam pasis la tempo, kiam oni ĉasis lernantojn. La lingvo alpaŝis al sia 100-jariĝo kaj la okupoj de la unuaj generacioj de esperantistoj „semi kaj semi“ jam donis sian frukton. Ciu, kiu povis amare elkreski el tiuj semoj, jam elkreskis. La movado atingis saturiĝon sur tiu nivelo, kaj plua semado estas jam senseca, ĉar, trakurinte la submetitan tapiŝon de „facila lingvo“, la lernanto vidas, ke post tiu tapiŝo estas jam nuda tero. Nenio! Do, li demandas sin, pro kio li entreprenis tiun facilan ekskurson laŭ bela tapiŝo. Cu nur por kelkpaŝa plezura promeno? Kaj same kiel amase venas la lernantaro, tiel ĝi ankaŭ foriras.

Kaj tiuj unuopuloj, kiuj restas, evidente faras malfacilan laboron de profunda studo. Tio estas seriozaj, altnivelaj specialistoj, sciencistoj kaj beletristoj, vidantaj la potencialajn eblecojn de la Internacia Lingvo (IL) por siaj profesiaj celoj. Naskiĝis ideo krei Sciencon Akademion kaj uzi IL por tiuj celoj. Kaj se preni tiun nivelon kiel ĉefan bazon de rezonoj, tuj evidentiĝos bezono de pli kvalifikita lingvo, ol la ĉiutaga, laika. Sociologoj revas pri unuecigo kaj pliprecizigo de kon-

cerna terminologio, IADEM ellaboras terminaron necesan por libere transdoni matematikajn leĝojn, same kemiistoj kaj fizikistoj, medicinistoj kaj biologoj. Ili ne volas paŝi kun litigitaj kruroj kaj belajn tapiŝojn ili ne bezonas, ĉar alĉutimigis iri netretitajn vojojn.

Kaj ĉu oni povas pensi, ke iuj el la sciencaj kaj teknikaj terminoj ne transiros en la lingvon de la komuna vivo? Vana espero!

Samtempe kun tiuj procezoj oni ne povas ne rimarki, ke librostokoj kuŝas sur deponejaj bretoj dum jardekoj. Intertempe fiaskis la provo eldoni gazeton „Semajno“, kaj mortis tiaj elstaraj altnivelaj presorganoj kiel „Norda prismo“, „Nica revuo“, „Suda stelo“, „Nuntempa Bulgario“, „Pollando“. Ĉio ĉi estas sekvo pro trotaksado de la lernantara rolo kaj subtakso de la rolo de kvalifikitaj esperantistoj. Sajne per heroecaj fortoj de superentuziasmoj estas kreita en Brazilo „Fonto“. Sed dume ne povas naskiĝi altnivela revuo pri Scienco kaj Tekniko.

Cu lernantoj povas krei aŭ subteni similan entreprenon? Necese estas konsumi malpli da fortoj por la lernantoj ol por la seriozaj uzantoj de la lingvo.

Se paroli pri neologismoj endas tuj kompreni, ke senbezona neologismoj ne aperas. Nebezonataj vortoj, proponataj de vantuloj, ne akiras agnoskon. Enradikiĝas nur necesaj neologismoj, kaj batali kontraŭ ili signifas surpaŝi de unu piedo sur la alian por plifaciligi la iradon, aŭ solvi taktikajn kaj eĉ strategiajn problemojn.

Ĉiuj persvadoj enmiksiĝi en la naturan evoluon de la lingvo kaj bremsi ĝin fontas el nekredo je la sanaj fortoj kaj mensoj de la esperantistoj, je la objektivaj leĝoj de la evoluo, kaj el deziro reguligi la evoluon arbitre laŭ personaj voluntaristaj streboj aŭ el timo,

ke la lingvo perdos vojon kaj implikiĝos inter arboj.

Ciuj lamentoj de la „limigantoj de la evoluo“ havas nenian efikon. La uzantoj de la lingvo adaptos ĝin al deca branĉo, temo kaj nivelo. Kaj la lingvo por la ĉiutagaj bezonoj restos same tiel facila, kiel ĝis nun, eĉ se en ĝi aperos kelkaj novaj vortoj.

Resume-konklude oni pli devas strebi kaj interesiĝi pri la enhava flanko de la Esperanta kulturo, ol pri ĝia forma esprimo. Necesaj estas verkoj de plej alta nivelo (romanoj, rakontoj, poeziaĵoj), sciencaj kontribuoj pri ĉiuj flankoj de la vivo, traktataj de ĉiusekaj, sed veraj sciencistoj. Eĉ se kelkloke oni uzos neologismojn.

Sed tamburado kaj gurdado pri la malutilo de la neologismoj ĉe foresto de la verkoj mem, atestas pri stagno de la enhava sfero de la Esperanta kulturo. E-movado estas sana natura

fenomeno de la moderna vivo, scienco, tekniko, ĝenerala kulturo de la homaro. Ĝi pasas laŭ certaj sociologiaj leĝoj. Apero de novaj vortoj ne neniigas la lingvon kaj ne ŝanĝas la facilecon de ĝia laika nivelo. Tiu procezo pasas, efektivigante de konsciencaj kulturaj homoj — adeptoj de Esperanto, samgrade interesitaj pri la prospero de la Esperanta afero.

Tial, laŭ mi, la diskutojn pri utilo-malutilo de la neologismoj oni devas universale ĉesigi en ĉiuj presorganoj kiel sensencan pistadon de akvo. Pli bone okupu lokon sur la paĝoj de niaj malabundaj presorganoj utilaj komunikadoj el la tekniko, scienco kaj valoraj belartaj kontribuoj. Lamentado pri la malplaĉaj vojoj de la evoluo nenion ŝanĝos en la reala procezo mem de la evoluo.

Rig-
USSR

N. DANOVSKI

NI RECENZAS

ELKRESKAS TALENTA E-PROZISTO



Tuj post tralego de „Mediteme“, en kiu estas prezentitaj originalaj kaj tradukaj prozaĵoj de la konata ĉeĥa esperantisto Oldřich Kníchal (nun loĝanta en Hungario), oni venas al konkludo, ke en lia persono la esperanta

literaturo povas esperi pri nova talento. „Mediteme“ ne prezentas grandan volumon. Entute en 70 paĝoj oni povas tralegi tri originalajn rakontojn sub komuna titolo „Intima kroniko“. Sekvas tri originalaj raportoj pri Japanio, Kubo kaj Hispanio. En la eseo „Bildo pri la epoko“ Kníchal kritike traktas la romanon „Kiel akvo del' rivero“ de la fama Esperanto-aŭtoro. R. Schwartz. En la traduka parto oni legas specialajn erojn el romanoj de grandaj ĉeĥlingvaj prozistoj. Krome: bibliografiaj notoj pri la tradukitaj aŭtoroj kaj pri Kníchal mem.

La lingvaĵo de la libro estas freŝa, facile legebla, moderna. Evidente, la aŭtoro bone regas Esperanton kaj scipovas utiligi ties vortriĉaĵon. Tiu aŭtoro kvalito reliefigas kiel en la originalaj eroj, kie memkompreneble li posedas pli grandan esprimliberecon, tiel ankaŭ en la tradukoj, kie li devas konsideri la originalon. Ne konante la ĉeĥlingvajn originalojn oni malfacile povas juĝi pri la arta nivelo de la tradukoj. Sed laŭ la tradukoj mem oni facile orientiĝas pri la literaturaj kvalitoj de la originaloj, apartenantaj al la plumo de monde konataj ĉeĥlingvaj prozistoj.

Leginte la biografiajn notojn pri Kníchal oni restas surprizita pro la vasta skalo de lia esperanta kaj ĉeĥlingva produktiveco kiel ĵurnalisto, publicisto, prozisto kaj tradukisto. En kunaŭtoreco kun sia edzino, la konata hungara esperanta ĵurnalistino Eva Tofalvi,

* „Panorama“, Literatura almanako de „Starto“. O. Kníchal: „Mediteme“. Selektio de originala kaj tradukita prozo. Eldono de Ĉeĥa E-Asocio, Praha, 1980.

Knichal verkis la romanon „Kiu semas plorante...“ En 1980 la aŭtoroj gajnis la nove starigitan prestiĝan premion de UEA „Raymond Schwartz“ por plej bona fikcia verko en Esperanto. Oni informiĝas ankaŭ, ke estas aperontaj du novaj originalaj verkoj de Knichal: rakontaro „Almozkonto“ kaj raportolibro „Gasto de malproksimo“ — bildoj el tri kontinentoj. Li krome okupiĝas pri tradukado de majstroverkoj el moderna ĉeĥa literaturo. Do, la internacia esperantista legantaro povas fieri pri nova E-prozisto kaj kapabla interpretanto de prestiĝaj ĉeĥlingvaj aŭtoroj.

Bondezirante al la aŭtoro pli profundan eniron en la socialan flankon de lia originala verkaro kaj pli fajnman precizigon de la esprimforto de lia lingvaĵo, mi asertas sen ajna risko, ke elkreskas nova E-talento. La modesteco kaj la rimarkinda laboremo de Oldřich Knichal prezentas garantion pri novaj liaj sukcesoj sur la originala kaj traduka kampo de la E-literaturo.

N. ALEKSIEV

NOTOJ PRI «ZAMENHOF KAJ LA CARA CENZURO»

La verko „Zamenhof kaj cara cenzuro“ de Adolf Holzhaus aperis en la revuo „Scienca Revuo“ vol. 25. — nr. 4.

La verkisto mencias en la prologo la situacion antaŭ Zamenhof kaj prezentas poste detalan tiaman staton pri la cenzuro. La temo estas pritraktata en vasta kadro de la problemoj. Tre interesa estas la petskribo de Zamenhof pro permeso eldoni ĉiusemajnan folieton en la internacia lingvo. Zamenhof motivas sian peton i. a. jene: Studadi kelkajn lingvojn ni ordinare eĉ unu el ili ne povas ellerni fande turmenti junajn kapojn per diversaj malreguloj deklinaĵoj kaj konjugacioj havas mizerajn rezultatojn.

Krom la gepatra lingvo devus studadi nur unu fremdan lingvon... Estas kompreneble, kiel la enkonduko de internacia lingvo de la plej antikvaj tempoj apartenas al la plej amataj revoj. Kion respondis la cenzuro? Oni rifuzis la petskribon pro tio, ke en la cenzura oficejo ne estas homo, kiu povas trarigardi eldonadojn en novaj inventataj lingvoj.

Verkisto Holzhaus ankaŭ mencias, ke i. a. Tolstoj suferis pro la cenzuraj malpermesoj de siaj verkoj, ke li estis adepto de Esperanto. Oni ekscias, ke Tolstoj taksis la malgrandan libreton (nome lernolibron) kiel gravegan eventon, utilan por la homaro. Al ĵurnalisto

Majnov li skribis pri la lingvo Esperanto: „Mi atente tralegis la lernolibron de la internacia lingvo kaj trovas, ke tiu lingvo plene kontentigas la bezonojn de internacia Eŭropo kaj Ameriko... mi klopodos disvastigi tiun ĉi lingvon.“

Interesa estas ankaŭ tio, kion la aŭtoro skribas pri la letero de Tolstoj al Rozen sub la titolo „Prudento aŭ Kredoj“.

La gazeton „Esperantisto“ havante la leteron kaj artikolojn ensendi al Rusujo malpermesis la cara cenzuro, ĉar ĝi ne deziris disvastigi nedeziratajn ideojn de Tolstoj.

La verkinto ankaŭ klarigas la rolon de „Posrednik“ (Peranto). Eĉ ne vortaro povis aperi. La ĉefa Cenzur-Administrejo konfiskis la manuskripton „Esperanto-germana lingvo“ kaj respondis: „Esperanto ne estas lingvo. Ĝi estas konspira rimedo por skribi esprimi siajn pensojn per simbolaj signoj. Ĝi similas al slango (ŝtelista lingvo)“.

Kompreneble, la cenzuraj malhelpoj kaj baroj sur ĉiu paŝo elpuŝis eĉ lin el ekvilibro.

Sed estas ne tasko de la recenzanto redoni la tutan enhavon de la verko.

Resume estas dirende, ke la artikoloj estas tre esenca parto de biografio pri Zamenhof kaj nepre legindaj.

OSKAR STOLBERG, GDR

INTERNACIA E-KONKURSO DE KOMPUTISTA SEKCIO

Komputista Sekcio de ISAE anoncas konkurson verki artikolojn pri ĉiuj temoj de komputado en larĝa skalo — de la teorio ĝis la konkreta aplikado.

Maksimuma amplekso — 4-5 tajpitaj paĝoj de formato DIN A/4, sed kompreneble indikeblas, ke ĉe la aŭtoro mendeblas pli ampleksa traktado.

La ricevitajn materialojn pritraktos internacia

ĵugantaro, por elekti la plej bonajn. La aŭtoroj de unu el ĉiuj 20 aperantaj artikoloj ricevas la rajton partopreni senpage en iu komputista internacia konferenco (en 1982 okazos 7). Krom tio, estos disdonitaj multaj valoraj premioj: libroj, kasedoj, periodaĵoj ktp. La artikolojn sendu al Komputista grupo de HEA (H-1368 Budapest Pf 193). Limdato: 15-a de marto 1982.

LA UNUA E-LIBRO EN ANGLA LINGVO

J. St. (en la unua Adresaro de la esperantistoj, 1889, (cenzura dato 18 (30) sep. 1889) sub numero 883 estas: Steinhaus, Julian, Warszawa, Dzielna N. 20, miesz. 12), tradukis Esperanto-libron en la anglan lingvon sub titolo „Dr. Esperanto's International Tongue. Preface and Complete Method, edited for Englishmen by J. St. Warsaw. 1888.“ (Cenzura dato 12 (24) jan. 1888).

L. Zamenhof por ĉiu Esperanto-libro donis rantan numeron kaj enskribadis en „Literaturon de Esperanto“. Sur la dorsa kovrilpaĝo de Dua Libro (cenzura dato 18 (30) jan. 1888) troviĝas Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia. Inter ili estas citita n-ro 5. International Tongue. En la fino de libro de Aldono al la Dua Libro de l' lingvo internacia (cenzura dato 6 (18) junio 1888) estas citita broŝuro de J. St. sub numero 5.

Richard Geoghegan tradukis Esperanto-libron en la anglan lingvon sub titolo „Dr. Esperanto's International Language. Introduction and complete grammar. 1889.“ Cenzura dato 5 (17) jan. 1889).

Pro tio, ke en la broŝuro de J. St. estis multaj ortografiaj eraroj, kelkaj frazoj estis preskaŭ tute ne kompreneblaj, L. Zamenhof detruis tutan stokon de broŝuroj de J. St. kaj en „Literaturon de Esperanto“ sub numeron 5 enskribis libron de R. Geoghegan.

Cu restis broŝuroj de J. St.?

E. Privat en la libro „Historio de la lingvo Esperanto“, 1927, kaj Enciklopedio de Esperanto, 1933—1935, ne mencias broŝuron de J. St. A. Zakrzewski en sia libro „Historio de Esperanto (1887—1912)“ 1913 sur la paĝo 15 mencias: „Dr. Esperanto's International Tongue. Preface and complete method edited for English by J. St. Warsaw. 1888.“

D-ro Jan Medrkiewicz en „Heroldo de Esperanto“, n-ro 50 (1807), 16 dec. 1934, skribas: „Dum la Antverpena kongreso en 1928 mi prezentis al Prof. Collinson el Edinburgh la broŝuron International Tongue. Robert Robertson el Londono, prezidanto de Brita Esperantista Asocio, iniciatis serĉadon de broŝuro International Tongue. Biblioteko de Brita Esperantista Asocio ne posedas ĝin, sed unu ekzempleron oni trovis en British Museum, kaj unu ekzempleron en la universitata biblioteko de Oxford. Do nuntempe estas konataj tri ekzempleroj de tiu ĉi broŝuro.“

En „The Australian Esperantist“, n-ro 188 (268), Junio 1981, sur paĝoj 25, 26, W. Auld en artikolo „Mia biblioteko“ skribas: „Inter miaj libroj estas ankaŭ kelkaj raraj: la libro n-ro 5. Dr. Esperanto's International Tongue. Preface and Complete Method, edited for Englishmen by J. St. Warsaw 1888“. Sekve, estas konataj 4 broŝuroj de J. St.

W. Auld per letero de 10. 9. 1981 informis min, ke li ricevis broŝuron de J. St. de Edinburga Esperanto-societo.

ADOLF HOLZHAUS

Dr. ESPERANTO'S
INTERNATIONAL
TONGUE.
PREFACE
AND
COMPLETE METHOD.

edited for Englishmen by J. St.

— por Angloj —

For making a tongue international it is not enough to call it so.

WARSAW.

Printed by Ch. Kelter, Nowy Świat Str. N. 11.

1888.

EN GDR — SPECIALA POŝTKARTO PRI 1300-JARA JUBILEO DE BULGARIO

Omaĝe al la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato niaj amikoj el la Lajpeiga Laborrondo Esperanto iniciatis la eldonon de speciala poŝtkarto kun originala desegnaĵo.

Dum la unua semajno de septembro j.k. speciala poŝtstampo estis uzata en la ĉefpoŝtejo en Lajpeig.

La poŝtkarto kaj la stampo estas haveblaj ĉe: Librovendistino de LLE — Helga Beau, Jacobstrasse 9, DDR — 7010 Leipzig.

BULGARINO GAJNIS UEA-LITERATURAN
KONKURSON



Depost dek jaroj Universala Esperanto-Asocio organizas ĉiujare literaturan konkurson, kiun partoprenas esperantistoj el ĉiuj anguloj de la mondo.

Ĉi-jare dum la okazinta en Brazilo UK estis sciigitaj la rezultoj de la konkurso pri 1981 jaro. Unua, dua kaj tria premio por poezio estis aljuĝitaj al Maŭro Nervi — Italio. Unua premio por prozo ne estis aljuĝita. Duan premion ricevis Bernard Golden — Hungario, kaj trian premion ricevis nia samlandano Neli Abagieva por la rakonto «Momento egala al heroo».

Neli Abagieva jam multajn jarojn laboras kiel kuraclegistino en Sofio. Ŝi estas instruisto de Esperanto. Unuafoje en 1937 en nia gazetaro aperis ŝiaj rakontoj, eseoj, kritikaj materialoj k. a.

Neli Abagieva regule kunlaboras en niaj E-eldonaĵoj, en la ĉiutaga kaj perioda gazetaro en la lando. Ŝi estas membro de la literatura klubo «Medicus» ĉe la Centra Domo de Kulturo de la medicinaj laboruloj.

La redakcio gratulas Neli Abagieva pro ŝia sukceso kaj deziras al ŝi plian fruktodonan literaturan agadon.

Ĉi tie ni publikigas ŝian premiitan rakonton.

MOMENTO EGALA AL HEROAJŬ

Nokto. La ĉefkirurgino de la porinfana hospitalo estas hejme. Subite la telefono eksonoras kaj maltrankviligas ŝin. Dum la telefona interparolo ŝia mieno ŝanĝiĝas, akirinte zorgoplenan aspekton. Nur post kelkaj minutoj, per sia aŭto ŝi alvenas en la hospitalon.

La hospitala korto estas senhoma. La ĉambroj — mallumaj, nur unu el ili lumas. La kirurgino rapidege, sen ia ajn halto, ascendas la ŝtuparon kaj baldaŭ eniras en la vastan, helan kabineton. Desur la vestokroĉilo la blanka laborrobo kvazaŭ salutgestus al ŝi. Ŝi urĝe surmetas la laborrobon kaj bridas siajn pufiĝintajn buklojn sub la blanka ĉapeto. Tuj poste, ŝi descendas senbrue al la akceptejo en la unua etaĝo. En la koridoro la dejoranta flegistino enkondukas ŝin en ĉambron n-ro 5. Sur la unua lito kuŝas 5-jara knabeto. La alia dejoranta kuracisto palpmezuras la pulson de la infano. Surfrunte la knabeto havas sangosaturitan pansazon. La longaj palpebroj kovras la okulojn. La virino ekstaras ĉe la lito kaj demandas:

— Kion indikas la rentgenfoto?

La dejoranta kuracisto etendas la manon, donas al ŝi la rentgenfoton kaj informas:

— Frakturon de la frunto.

La kirurgino en blanka laborvesto longan tempon trarigardas atente la nigro-blankajn liniojn de la foto, poste redonas ĝin al sia kolego kaj ree demandas:

— Kiamaniere okazis la akcidento?

Oni klarigis, ke la knabeto eliris subite el kooperativa loĝbloko, ekkuris rapide al la strataro kaj falis sub la radojn de venanta renkonte al li taksio. La surprizita ŝoforo ne povis tuj haltigi la aŭton. Li alveturigis la infanon tien ĉi kaj tuj iris informi la policon pri la akcidento.

— Preparu tuj la infanon por operacio!

Kiam la reflektoro eklumigis la infanan kapeton, kuŝantan senvive sur la kuseno de la operacia tablo, du lertaj manoj ekprovis revenigi al li la vivon. Kelkaj ŝvitgutoj aperis sur la frunto de la kirurgino. Ŝi sentis nenion ĉirkaŭe. Ŝia tuta atento estis koncentrita al la sukcesa realigo de la operacio. La surloke farita rentgenfoto donis bonan rezulton. La rompita osto estis sukcese kunligita kaj alĝustigita. Sekvis kosmetika kunkudro. Post kelkaj minutoj la blanka antisepsa gazo premkovris la operacitan lokon. Bandaĝo ankaŭ ĉirkaŭvolvis la kapeton, kiu aspektis kiel granda blanka bulo. Sekvis preskribo de medikamentoj.

En tiu ĉi momento oni aŭdis en la koridoro malesperajn plorkriegojn de virino. Ies manoj ekfrapegis sur la pordon de la vestiblo:

— Lasu min eniri! Mi volas vidi mian infanon!

La kirurgino ektremis. Ŝi malfermis la pordon, preta trankviligi kaj konsoli la patrinon.

Por momento, la du virinoj ekstaris vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Ili ekrigardis sin reciproke. La kirurgino fikse observis la patrinon kaj subite rekonis ŝin. La lipoj, plenaj de varmaj kompatemaj kaj konsolaj vortoj, restis kiel glaciigitaj. Ŝi retroiris unu paŝon kaj apogis sin al la muro.

La alia virino, kun larĝe malfermitaj okuloj staris kvazaŭ hipnotizita. Ŝiaj lipoj, kun nefindiritaj demandoj, restis duonmalfermitaj. Nun paliginta vizaĝo, ŝi ekŝanceliĝis, la korpo skuigis, klinis sin antaŭen kaj lasis sin fali surgenue, ĉirkaŭprenante la genuojn de la kuracistino. Kvazaŭ svenonte, ŝi ekflustris humile:

— Pardonu min! . . . Mi petegas pardonon! . . .

La kuracistino staris kiel granita monumento, pala, kun malestime kunpremitaj lipoj, kun pugnigitaj pendantaj manoj. Granda sufero estis pentrita sur ŝia vizaĝo. Ŝi povus levi piedon kaj treti la bruston de la virino falinta surgenue ĉe ŝiaj piedoj. . . Ŝi povus kapti ŝin je la distaŭzita hararo kaj ekteni ŝin laŭ la planko de la koridoro. . .

Sed ne! Ŝi mobilizis ĉiujn siajn fortojn, ekskuis la kapon kaj venkis sin mem. Eten-dinte la manon, ŝi ektuŝis la ŝultron de la virino. Per fremdeca voĉo, kvazaŭ venanta elsub la tero, ŝi diris:

— Iru en la ĉambron n-ro 5. Tien oni for-portos la infanon. . .

Kaj, turninte sin, ŝi ekpaŝis al ŝia kabineto, sentante vertigon. La kruroj tremis. La tuta hospitalo kvazaŭ lulis sin sub la piedoj kune kun ĉiuj ĉambroj kaj koridoroj. En ŝia kapo, kvazaŭ de trapafita birdo, baraktis pensoj: „pli baldaŭ ŝi atingu sian kabineton. . . pli baldaŭ ŝi restu sola kun si mem. . .“ En ŝia animo io estis diseriginta kaj transformi-ginta en polvon. Eble la suferego, akumuli-ginta dum pluraj jaroj, aŭ ankaŭ la vundita digno. . . kiu devis cedi al la kuracista devo. . . La tremantaj fingroj ektuŝis la pordon de la kabineto, ŝi malfermis ĝin kaj eniris. Ferminte la pordon, ŝi proksimiĝis al la lito, lasis sin fali tien kaj restis longe, frakasita ĉagrenita, en plena soleco. En la oreloj sonadis la vortoj: „Pardonu min! . . . Mi petegas pardonon! . . .“

Jes, la virino petegis pardonon! Sed, ĉu estis eble kunmeti en unu tuton la milojn da pecetoj je kiuj tiu ĉi virino disrompis ŝian familion? Ĉu estis eble, ke ŝi denove revenigu

al si la edzon, kiu hodiaŭ en la tribunalo, ĉe ŝia lasta apero por la divorceproceso, deklaris, ke li amas alian virinon, kiu naskis al li filon kaj tiel feliĉigis lin! Ho, tion oni ne povas tiel facile pardoni! Divorceproceso, daŭrinta tiom da jaroj, unu por ĉiam disrom-pita familio, unu forrabita vivo. . . Nel! Si povis nek pardoni, nek forgesi, sendepende de tio, ke hodiaŭ ŝi savis la infanon, kiu disigis ilin. Ekskuite la kapon, ŝi indigne ekprotestis kontraŭ sin mem. Ĉu la infano kulpas? Ĉu dum tiuj kelkaj jaroj ŝi kiel kirurgo, dividis siajn pacientojn en amikojn kaj malamikojn? Sur la operacia tablo ĉiam kuŝis nur homoj, atendantaj savon.

Ŝi, la kuracistino, ne povis naski, sed tio ne malgrandigis ŝian amon al la infanoj. Por ilia savo ŝi dediĉis sian tutan vivon, oferis siajn festojn, sian printempon, kaj ĉiam batalis brave por savi ilian vivon.

Subite iu interrompis la duelon en ŝia animo. Anhelante, eniris la flegistino, kriante:

— Mi petas vin, venu tuj! . . . La infano estas agonianta. . .

Aŭdinte tion, ŝi saltleviĝis, forgesinte ĉion kaj ekkuris post la flegistinon. Antaŭ la ĉambro n-ro 5 ploregis malespere la patrino de la knabeto. Pasante preter la ploranta virino, la kuranta kirurgino eĉ ne rimarkis ŝin, malfermis tuj la pordon. La deĵoranta kuracisto en la momento tenis la du senfortajn manetojn, kiuj penadis forigi la bandaĝon desur ŝia frunto. . . La kuracistino sin turnis al la flegistino:

— Alportu tuj la aparaton por transfuzado. Ni ne devas permesi anemion de la cerbo!

La flegistino respondis:

— Mi komisiis al la ŝoforo alporti tuj la respektivan sangon, ĉar tie ĉi mankas la sangogrupo „A“, tamen ĝis nun li ankoraŭ ne estas reveninta. . .

Kiam la eksa edzo de la kirurgino eniris la ĉambron n-ro 5, li vidis, ke ĉe la lito de lia filo estas metita unu risortlito, sur kiu kuŝis lia „Eksa edzino“. El ŝiaj vejnoj la deĵoranta kuracisto eltiradis sangon por transfuzi ĝin al lia filo. Li demetis la ĉapelon, klinis la kapon respektoplene kaj restis muta. Li komprenis ĉion. . .

Tio estis momento de sinofero, pri kiu ne ĉiu homo kapablis — momento egala al heroj!

Sur lia pala vizaĝo ekfluis larmoj. Kaptita de admiro kaj profunde kortuŝita, li malfermis la pordon kaj eliris senbrue.

Elekstere, la suno strebis penetri tra la fenestro por alporti la savon.

NELI ABAĜIEVA

Du bulgaraj historiaj operoj



Sceno el la opero „Ĥano Asparuh“



Sceno el la opero „Ĥano Krum Juvigi“

La 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato altiris la atenton de multaj bulgaraj agantoj de la arto kaj kulturo.

Sur la scenejo de la Nacia teatro pri opero kaj baletto en Sofio jam estas prezentitaj du novaj verkoj de la opera arto — la historiaj operoj „Ĥano Asparuh“ de la popola artisto Aleksandar Rajčev kaj „Ĥano Krum Juvigi“ de la merita artisto Aleksandar Josifov.

Je historia temo povas esti kreitaj nuntempaj laŭ ideo kaj patoso verkoj. En ili ni devas serĉi la harmonion kun la plej gravaj problemoj, kun impeto de nia nuntempo.

La kreantoj devas konsideri la historian evoluon de la spirita vivo de la bulgara popolo, analizi la kronitan per romantika aŭreolo oferpretecon, per kiu abundas nia nacia sorto. Rigardate el vidpunkto de nia nuntempo, la agoj de la historiaj personecoj akiros novajn mezurojn kaj pli vastan amplekson, kunfandos sian forton kun la patoso de nia nuntempo.

La opero „Ĥano Asparuh“ estas glorigo de la fondinto de la bulgara ŝtato. La personeco de Asparuh estas ĉirkaŭita per romantiko, heroeco kaj majesto. La opero sekvas la dramaturgian linion de la novelo „Aĥinora“ de la verkisto Nikolaj Rajnov, kiu starigas la problemojn pri la gvidanto kaj la heroo, kiu posedas ĉiujn pozitivajn ecojn por kontraŭstari al la historiaj ŝanĝoj kaj eventoj.

La plej granda kontribuo de Asparuh al la estonto estas la venko de la kontraŭecoj de lia epoko, la venko super la Bizanca imperio, la venko super sin mem, per ofero de la propra feliĉo en la nomo de l'unuigo de prabulgaroj kaj slavo.

Laŭ sia karaktero la opero estas heroo-romantika verko. La muzika lingvo estas ligita kun la tradicioj de la bulgara komponista skolo.

*

En sia opero „Ĥano Krum Juvigi“ la komponisto Aleksandar Josifov kaj la scenaristo Bančo Banov faris provon penetri la foran antikvecon de la bulgara ŝtato — la periodon de regado de la fama bulgara ĥano Krum Juvigi (la Granda).

Tiu ĉi opero estas la unua verko de Aleksandar Josifov en tiu ĝenro kaj estas talente kaj sincere verkita.

La epoko de ĥano Krum estis heroo, legenda, sed la konkretaj historiaj faktoj kaj materialoj estas tre malabundaj. Pri la vivmaniero kaj pri la moroj de la bulgaroj de VIII jarcento la aŭtoroj ĉerpis ideojn observante la ruinojn de la palaco en la antikva bulgara ĉefurbo Pliska. La personeco de ĥano Krum estas glora, epika kaj samtempe tragedia — ligita kun la sortoj de lia filino Vineĥa kaj de la slava bojaro Dragota.

Pri ĥano Krum ekzistas legendoj, sed la historio difinis lin kiel unu el la plej saĝaj kaj grandaj strategoj kaj ŝtatestroj de sia epoko, kiu stabiligis la aŭtoritaton kaj la sendependecon de la tiama bulgara ŝtato.

La du historiaj operoj „Ĥano Asparuh“ kaj „Ĥano Krum Juvigi“ pliriĉigas la bulgaran muzikarton kaj viciĝas inter la originalaj kaj talentaj verkoj de niaj nuntempaj komponistoj.

"ĤANO ASPARUĤ"

(NOVA BULGARA ARTFILMO)



Sceno el la filmo

Tiu ĉi nova triseria historia filmo-epopeo estas dediĉita al la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato.

Unuiginte historiajn faktojn, dokumentojn kaj eventojn kun la arta elpensado, la aŭtoroj revenigas la spektantojn en la foran VII jarcenton kaj serĉas la radikojn de la bulgara nacia memfido kaj memkonscio, igas nin esti fieraj pro la 13-jarcenta ekzistado de la bulgara ŝtato, rekreas la heroaĵojn, de niaj praavoj en sennombraj militoj kaj bataloj, indajn je laŭdo kaj adoro.

La scenaro enhavas tri partojn: „Fanagorio“, „Transmigro“ kaj „Tero por ĉiam“. Ĝi estas kreaĵo de la eminenta bulgara verkistino Vera Mutaĉieva. La bildoj estas filmitaj de kinokameristo Boris Janakiev kaj la muziko estas verko de la komponisto Simeon Pironkov.

La reĝisoro Ljudmil Stajkov, konata per siaj filmoj „Amo“ (gajninta arĝentan medalon en la Moskva filmfestivalo), „Aldono al la leĝo por defendo de la ŝtato“ kaj „Iluzio“, dividas siajn konceptojn pri la filmo kaj pri siaj kreaĵ pozicioj:

— Ni strebis disponigi al la spektantoj etnografian impreson kaj provoki admiron pro la nuntempaj teknikaj kaj artaj eblecoj pri rekreado de iamaj brodaĵoj kaj forĝita fero. Krom tio nia grava ideo estas krei ĉe la spektantoj nacian fieron kaj memkonscion pro la majesteco de la faroj kaj heroaĵoj de niaj praavoj el la fora historia pasinteco. . .

En la ĉefaj roloj ludas la aktoroj Stojko Peev (Ĥano Asparuĥ), Antoni Genov, Bogomil Simeonov, Vanja Cvetkova, Anton Gorĉev k. a.

La filmo „Ĥano Asparuĥ“ estas la plej impona kaj la plej granda bulgara filmproduktado en la moderna historio de la bulgara socialisma filmarto.

HISTORIISTOJ PRI LA BOGOMILISMO

... Dum la XIII-a jc en Eŭropo ekzistis dekse herezaj movadoj: ses en Italio, kvar en Francio kaj la ceteraj — en orientaj landoj. Je la fino de ilia listo staras «Eklezio bulgara» kaj «Eklezio paŭlikeana». Ili ĉiuj originas el la du lastaj.

REINER SACCONI,
elstara mezepoka teologo.

... En la XIII-a jc la bogomilismo disvastiĝis inter la slavaj medioj sur la Balkana Duoninsulo kaj estiĝis ĉefa kerno de ĉiuj ceteraj herezaj movadoj, skuintaj Eŭropon.

Prof. H. MÜHLSTEIN,
franca historiisto.

... Oni ne povas ne rekonii la ligon inter la bogomilanoj kaj la francaj herezuloj — la kataroj, precipe kun la moderaĵ bulgara bogomilanoj.

R. NELLE,
franca historiisto

... La radikoj de ĉiuj herezaj movadoj en la mediteranea regiono estas ligitaj kun la bogomilismo, kiu en la XI-a jc disvastiĝis en tuta Balkana Duoninsulo (precipe en Bulgario) kaj fine al Konstantinopolo.

Prof. E. GRIFF,
franca historiisto.

... El ĉiuj nomoj, atribuitaj al la herezuloj en Bulgario, plej konvena estas la epiteto «bogomilanoj». En ĝi nestas la rememoro pri popo Bogomil, fondinto de la herezo, kaj la senco de lia doktrino.

MANDIĆ,
esploranto de la bosnia eklezio.

... Kataroj estis konataj sub la nomo «bulgar», ĉar ilia ĉefa haveno kaj lulilo estis Bulgario.

ETIENNE DE BOURBON,
teologo, XIII-a jc.

NOVAJ SUKCESOJ DE BULGARA PUPTEATRO

„La dekkvaran fojon eniras nian vivon pupoj el diversaj scenejoj de Eŭropo. Ni invitis ilin por pliriĉigi internacian Infanan semajnon. Sed ni esperas, ke ili pliriĉigos ankaŭ nin, ke ili haltigos nin por momento en nia vivkurado kaj ke ili revigos nin per sia movo, voĉo kaj sia ideo.

Ankaŭ ĉi-jare vi utiligos komunan lingvon, kiu estas internacia samkiel internacia estas pupteatra arto.

„Dankon al vi, pupistoj, por viaj pupoj!”

Kun tiuj salutvortoj sin turnis la organizantoj de PIF al la pupistoj el Rigo kaj Barcelono, Konstanco kaj Varsovio, Kargali, Niš, Zemun, Zagreb.

Serioza konkurado por la juna pupa teatro kun junaj geaktoroj el la bulgara urbo Kargali!

Ili prezentis por infana kaj aĝa publiko la prezentaĵon „La mistera hipopotamo” de Kiĉanova kaj Liŝic. Entuziasmo regis en la arta laboro de reĝisoro M. Jankova, de la scenografo D. Nikolova, komponisto K. Taney, tradukisto B. Beleva.

Kvar spektakloj — du en Dubrava, du en Velika Gorica (la centro de la festivalo) — prezentis la junaj pupistoj el la pupteatro de Kargali. Sekvis renkontiĝoj kun kolegoj

el aliaj landoj, interparoloj, ŝanĝo de libroj, de signoj, de memoraroj.

La senpera kontakto de pupistoj kaj pupoj kun la vasta publiko, ĝia partopreno en la sceneja ago mem elvokis ridon, aktivan reagon, aplaŭdojn.

... Solena fermo de la festivalo ĝojigis la Pupan teatron el Kargali per tri premioj!

Internacia infana jurio, konsistanta el 27 infanoj el Hungario, Pollando kaj Jugoslavio, skribis voĉdonis por la prezentaĵo „La mistera hipopotamo”, kiu plej plaĉis al la infanoj. La premio estas la pupo „PIKO BODLJIC.”

Internacia lingva jurio, konsistanta el Jim Cushing (Usono), Mika Vaseda (Japanio) kaj Roger Imbert (Francio), atribuis la unuan premion pro scena viva Esperanto.

Internacia faka jurio, konsistanta el Randi Nielsen (Norvegio) Stanka Godniĉ (Jugoslavio) kaj Nevenka Imbert (Jugoslavio), atribuis agnoskon pro sukcesa animigado de pupoj.

Gratulojn, junaj aktoroj!

Gratulojn al vi, junaj esperantistoj!

[Gratulojn al via instruanto en Esperanto — k-do Kerelezov!]

Plensukcesan estontan laboron en via arta kaj esperantista vojo!

BELKA BELEVA



MIGRANTA EKSPOZICIO PRI BULGARIO EN ĈSSR

Mi ĉiam estis kaj restos granda amiko de Bulgario. Nun ni sukcesis fari ekspoziciojn dank' al esperantistoj en Polŝi, Trambes, kiuj disponigis al ni vere interesan materialon. Ĉio estis priskribita en Esperanto, ni facile ĉion tradukis en ĉiun lingvon kaj per tio Esperanto farigis ponto, dank'al kiu ni povis festi vian grandan okazadon. Kvankam la ekspozicio estas modesta, ni proponas ĝin al pluaj rondetoj en ĈSSR kaj mi kredas, ke ĝi nunjare migros al pluaj lokoj. Esperantistoj el Trebiĉ, kiuj havas ĝemelkontakton kun esperantistoj el Velingrad, volas prunti la materialon kaj ekspoziciigi ĝin en sia urbo kaj ankaŭ en la Somera Esperanto-tendaro en Lančov, kiun ili organizas jam 29-foje. Eble tiu okazaĵo meritas mencio en la bulgara gazetaro.

Dr. Kočvara, ĈSSR

NADJA ANDRIANOVA DENOVE GASTAS AL NI

Nadja M. Andrianova — ukraina verkistino, tradukistino kaj ĵurnalistino-publicistino, estas naskita en familio de laboristoj en la urbeto Vasilkovo, distrikto de Kievo (Ukrainio, USSR). Ŝi finis siajn studojn de ukraina kaj rusa filologio en la Ŝtata Universitato en Kievo. Aldone ŝi ekposedis diplomojn pri E-instruado de la Tarta Ŝtata Universitato (Estonio, USSR) kaj de la Internacia E-kurso en Burgas (Bulgario). Dum 16 jaroj ŝi laboris kiel redaktorino en la plej granda ukraina eldonejo pri belarta literaturo «Dnipro», en ties fremdlingva redakcio. Pli malfrue ŝi okupiĝis pri krea laboro.

Nadja Andrianova estas membro de la Unuiĝo de Sovetaj Verkistoj ekde 1957. Ŝi laboras en la sfero de ukraina prozo, literaturscienco, publicistikado, tradukas belartan literaturon el diversnaciaj lingvoj. Ŝia belarta-dokumenta libro «Ekbruligis mi fajron en kor'...» (310-paĝa) pri la vivo de la fama blinda ukraina esperantisto-poligloto, verkisto, pedagogo kaj mondmigranto Vasiliĝ Eroŝenko aperis en du eldonoj. Pluraj ĉapitroj — fragmentoj el ĝia E-varianto, estis publikigitaj en la japana E-revuo «L'Omnibus».

Ŝi eldonis ankaŭ plurajn kelkdekojn da libroj, monografioj kaj aliaj literaturaj verkoj. Dum kelkaj jaroj Nadja Andrianova redaktis la E-presbultenon «Ira Soveta Ukrainio». Ekde 1969 ŝi estas fakdelegito de UEA pri literaturo kaj ĵurnalismo por Kievo. Nun ŝi estas vic-prezidanto de la ukraina MEM-sekcio ĉe la Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE).

Siaj originalaj kaj tradukaj poeziaĵoj, eseoj, artikoloj k. a. ofte aperas sur la paĝoj de diversnaciaj E-periodaĵoj. Multaj E-poeziaĵoj de N. Andrianova gajnis literaturajn premiojn de internaciaj E-konkursoj («Larus» — Italio 1977; «Paco» — Pollando, 1980/1981; «Muzo» — Soveta Litovio, 1977/1978/1979).

Antaŭ nelonge N. Andrianova vizitis nian landon kaj denove ĝuis la varman bulgaran gastamon. Ĉi-sube ni publikigas ŝian versajon, dediĉitan al la 1360-jara jubileo de la bulgara ŝtato.

BULGARIO — TERO FRATA

Al mi donacis la bulgara kara ter'
trezorojn multvalorajn por la koro, —
ne vane prenis mi en la animon
ĝian naturon, historion, la heroojn, —
la tutan landon, per legendoj penetritan,
kaj sentas min kiel riĉulo-feliĉulo,
ĉar pliriĉigis malavare min spirite
heroo, nobla, liberama fratpopolo.

Kaj ne nur mi ja ĝin omaĝi povus —
respektoplene, danke kaj varmkore —
sentante tamen min la ŝuldantin' eterna.
Ne nur al mi, polvo ero de la mondo, —
al tuthomar', al ĝia trezorejo,
multege ja donacis eta Bulgari':
kiel nestingeblaj, nemortemaj torĉoj,
por ĉiam restos en homara histori'
la Apostolo de Libero — Levski, Botev, Dimitrov
kaj multaj-multaj la herooj nekonataj.
Kiuj dum viv' ne cedis al kruela tirani',

sentime kaj sindone luktis por libero,
mortos neniam,
al batalo justa vokos ĉiam
popolojn subpremitajn de l' sanganta tero...

La vojoj de amikoj-samcelanoj
instruas min pli inde, plenvalore
en nia mondo malkvieta vivi,
spiritalajn horizontojn plilargigas
kaj ĉiam pliriĉigas la animon.
Spirad' de l'Amikeco plej natura, —
ho kiel multe donas ĝi al homo —
se vere homoj —

ne «stomakoj dupiedaj»
estas ni!...

Sofio,
Septembro, 1981

NADJA ANDRIANOVA,
Kievo, USSR

NOVAĴOJ EL SOVETIO

Vigle agadas la Centra urba E-klubo en urbo Novosibirsk. Unu el la plej amase vizititaj arandoj de la klubo estis la solena festado de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, organizita antaŭ nelonge. Membroj de la klubo prelegis pri la historia vojo de la bulgara popolo, pri la fondiĝo de la bulgara nacieco kaj pri la disvolviĝo de la slava kulturo dum la jarcentoj. Estis prelegoj ankaŭ pri la nuntempa vivo de socialisma Bulgario kaj pri la akiraĵoj de la laborema frata popolo en ĉiuj sferoj de la vivo — ekonomio, kulturo, scienco kaj arto. Specialan atenton oni turnis al la esperantista movado en Bulgario kaj kelkaj samideanoj dividis siajn rememorojn pri la UK en Varno — 1978. Ili prezentis prospektajn de pitoreskaj lokoj en malproksima suna Bulgario.

Okaze de la 70-a naskiĝtago de la eminenta gvidanto de la Bulgara ŝtato kaj de la komunista partio de Bulgario — k-do Todor Ĵivkov, oni prelegis pri lia rimarkinda vivo kaj pri lia kontribuo al la nedisigeblaj frataj rilatoj inter Bulgario kaj Sovet-Unio.

☆
Estonia Ministerio por klerigo akceptis Esperanton kiel fakultativan lernobjekton en la oficiala listo kaj nun en estonaj lernejoj eblas instrui la lingvon ekde la 5-a klaso (11-jaruloj). Aperis jam dua eldono de la lernolibro por lernejoj estonaj de J. Palu. En preparo estas „Legolibro por lernejoj“ de la sama aŭtoro, kaj en 1982 aperos la dua eldono de la lernolibro de J. Ojalo, relaborita kaj kun pli granda vortara parto.

En la laborplano de la Estona Filio de ASE estas antaŭvidita arango en 1982 de somera tendaro por lernantoj de Esperanto, tendaro por junularo, kaj oficiala kurso por Esperanto-pedagoĝoj. Laŭplane oni laboras ĉe kelkaj fakvortaroj en kunlaboro kun esperantistoj el kelkaj sovetaj respublikoj.

En du estonaj lernejoj oni amase lernas Esperanton en la 5-aj kaj 6-aj klasoj (11—12-jaraj gelernantoj). Oni jam atendas korespond-amikojn. La adresoj de la lernejoj:

20006 TALLINN, 10. Keskkool, Esperanto, Estonio, USSR
200029 TALLINN, 44. Keskkool, Esperanto, Estonio, USSR

ENHAVO

* * *	1300-jara Bulgario jubileas	11
	Todor Jivkov. Parolo pri Bulgario	1
* * *	Lingvo sankta de l'praavoj niaj	4
	Evtim Evtimov. Poemo pri Bulgario	5
	Doc. N. Srebrov. La bogomilismo — kontribuo al la spirita kaj socia evoluo de Eŭropo	6
* * *	Ĥristo Karpačev — flama poe'o kaj batalanto	7
	Olga Cankova. D-ro Panajot Ĥitrov — pasla E-propagandisto	8
* * *	Sofiaj esperantis'oj pridiskutas revuon „Bulgara Esperantisto“	9
	Radi Bančevski. Teori-praktika seminario por E-korespondan oĵ	11
	L. Miĥajlov. „Dormuĉambro, legolibro?“	14
	N. Danovskij. „Neologisma mataĵo“	15
	N. Aleksiev. Elkreskas talenta E-prozisto	16
	O. Stolberg. Notoj pri „Zamenhof kaj la cara cenzuro“	17
	A. Holzhau. La unua E-libro en angla lingvo	18
	Neli Abaĝieva. Momento egala al heroaĵo	19
* * *	Du bulgaraj historiaj operoj	21
* * *	Ĥano Asparuh	22
	Belka Beleva. Novaj sukcesoj de la bulgara pup-teatro	23
	Nadja Andrianova. Bulgario — tero frata	24
	Sporto: La bulgarinoj konkeris la „oron“	IV

Sur la unua kovrilpaĝo: Ĥano Asparuh — sceno el la samnoma bulgara filmo.

Redakta komitato

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BAČEV, Vasil BOROVANSKI, Prof. Vasil ĈOČOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV, Lidia RAEVA.

Administranto: Kalinka VASILEVA

NIAJ PERANTOJ

Britio, Covenham Louth, Lincs., LN11 0PF
„Lavercroft“, Main Road, s-ro Paul Hewitt
Jarabono 2.50 l. sier.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10 11000 Praha 1. Jarabono: 5 u s. dol. aŭ egalvaloro.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmermova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Prpek.

Danlando. Torholmsvej 23, 5800 Hjørring
s-ro J. H. Eriksen
Poŝtkonto 148 3951
Jarabono 37,98 kr.

Francio. F 54510 Tomblaine, B. P. 23,
s-ro Roger Degrelle
ĝirkonto 771.77 R, NANCY
Jarabono 20. — l. f.

Finnlando. PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,
Finn Esperanto-librejo
Jarabono 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko.
DDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60,
Der Esperantist
Centra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina
Iggebach, Schlossgasse 30, poŝtekkonto n-ro 1653
48-678 ISHN D-6731 Elmstein
Jarabono: 8 gmk

Hispanio. Adonis Gonzalez Meana
str. Marcelino González, 5-4º-doh.
Gijón (Asturias)
Jarabono: 300 pesetoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p.k. 153, H-1443 Budapest

Kubo. Ciego de Avila,
apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz

Portugallio, Portugal Esperanto-Asocio, R. DR. Joao Couto, 6 R/C. A P — 1500 Lisboa
Jarabono: 230 esk.

Sovet-Unio, 203016 Tallinn, Estonio, do vostrebovanija
Johannes Palu
Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio. Hanoi, 222 Dôl Càn.

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 — distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

tel. 32-40-68, 31-00-29

LA BULGARINOJ KONKERIS LA „ORON“!



Sonas la nacia himno de Bulgario kaj sur la p'ej alta fosto solene suprenlitas la bulgara standardo. Tanja Gogova, kapitano de la bulgara teamo, tenas la Vazon, kiun s-ro George Bondry, prezidanto de la Eŭropa

Federacio pri retpilko, enmanigis al la plej forta retpilka teamo en Eŭropo. Sur la brustoj de la bulgarinoj brilas oraj medaloj kaj en iliaj okuloj — larmoj de ĝojo kaj fiero. Ja la venkon ili atingis en streĉoplena batalo kontraŭ la plej fortaj teamoj de Eŭropo kaj rajte meritis la plej altan distingon...

Jen kion diris post la matĉo la trejnisto de la sovetia teamo Nikolaj Karpov: „La bulgara teamo estis neordinare forta en la defendo. Niaj junulinoj eĉ ne sukcesis adaptiĝi al la ludmaniero de siaj rivalinoj. En la atako ni ne aspektis pli bone. Oni ne devas subtaksi ankaŭ la rilaton de la publiko. Sed plej grava estas la fakto, ke la bulgarinoj ludis pli bone ol kiam ajn aliffoje. Mi opinias, ke ĉiu el la sportistinoj havas sian kontribuon por la venko, sed se iuj meritas apartan laŭdon — tio estas Anka Uzunova kaj ankaŭ la distribuanto de la teamo Verka Stojanova. Sen ili la teamo ne estus tiom forta“.

PENJU PENEV

DEZIRAS KORESPONDI

IRANO

Hosein Meyari (21-jara) — dez. kor. kun ĉi pri muziko (Pop-Rock-Disco), pri vojaĝoj, revuoj, foto, literaturo, libroj, sporto, amo k. a. Adreso: P. o. Box 488, Karaj, Iran.

SVEDIO

S-ro Jan Vedevid (60-jara oficisto). Poste restante, 401 01 Göteborg 1, Svedio — dez. kor. pri literaturo, arto, ŝako.

RUMANIO

Dinu Mariana, (13-jara) R — 0716 Licuriciu, Calinesti, Teleorman, Rumanio — dez. kor. kun samaĝuloj el ĉi.

Paşarelu Jon, (studento en Politeknika Instituto) Loc Deso, jud Loli, Ced 1292, Rumania — dez. kor. kun samaĝuloj el Bulgario.

Ruma aj gelnaritoj (10—17-jaraj) — dez. kor. kun samaĝuloj el Bulgario.

— Koble Iosif (15-jara knabo), Piata Unirii 20, 3280, Sing. de Padure, Rumanio.

— Kallos Annamaria (10-jara), str. Morii 5/A, 3280 Sing. de Padure, Rumanio.

— Gall Irma (16-jara), str. Piincipala 259, 3284 Viforoasa, Jud. Mures, Rumanio.

— Verress Julianna (17-jara), str. Bartha 81, 3291. Trei Sate, Rumanio.

— Csvath Rezia (16-jara), str. Rozelor 74, 3280 Sing. de Padure, Rumanio.

Köő Hajnal (16-jara knabino), str. Rozelor 110, 3280 Sing. de Padure, Rumanio.

ĈEĤOSLOVAKIO

Ili Darda (53-jara teknikisto) — kun ĉi pri historio, numizmatiko, poŝtmarkoj, muziko kaj pentrcarto. Adreso: V domice 191, 41301 v. Roudnice 12, CSSR.

9 novaj geesperantistoj (20—55-jaraj) — dez. kor. kun ĉi pri ĉi. Interŝ. PM kaj BK. Komuna adreso: TROJAN Vojta, 542—01 — ZÁCLER 364/B, Ĉeĥoslovakio (Bohemio).

HUNGARIO

10—11-jaraj esperantistoj dez. kor. kun bulgaraj gelnaritoj. Komuna adreso: 4A kaj 4B klasoj, 2 sz. Alt iskola, Dunakeszi H-2120, Hungario.

Kerekes Mária (21-jara), studentino, dez. kor. kun samaĝuloj el Bulgario pri bulgaraj literaturo, kulturo kaj vivo. Adreso: Biharkeresztes, Ságvári 6, H-4110, Hungario.